

Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj

Kongresa temo de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto
Torino, Italio | 29-a de julio ĝis 5-a de aŭgusto 2023

kaj de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto | 23-a ĝis 26-a de novembro 2023



Dokumentoj pri la trakto de la kongresa temo:

kongresa rezolucio, kompilo kaj resumo de prelegoj
statistikoj kaj grafikaĵoj



Universala Esperanto-Asocio

La Universalaj Kongresoj de Esperanto (UK) okazas ekde 1905, neokazintaj nur dum la mondaj militoj kaj antaŭnelonge dum la pandemia periodo, kiam tamen ili estis anstataŭigitaj de la Virtualaj Kongresoj (VK). La UK estas la plej grava Esperanto-evento de la mondo kaj sendube estas inter la internaciaj eventoj kun plej longtempa tradicio. Cetere nuntempe ankaŭ la VK fariĝis la plej grava reta evento de Esperanto. Ambaŭ apartenas al Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj kune allogas milojn da esperantistoj.

Ĉiujare la UK proponas unu difinitan temon, surbaze de kiu okazas dediĉita programo de prelegoj kaj aliaj aktivecoj. Por kunordigi tiun specifan agadon ekzistas la figuro de la reĝisoro de la kongresa temo, kiun nomumas la Estraro de UEA. Kiam la VK estis iniciatita, ĝi ankaŭ akceptis por si la temon de la UK en la koncerna jaro. Ekde 2022 okazas ambaŭ eventoj, la UK kaj la VK: la UK meze de la jaro, en julio-aŭgusto, kaj la VK en novembro. Tio signifas, ke nuntempe la Esperanto-komunumo havas pli longan periodon por aprezi la elektitan temon dum la jaro. En 2023 ĝi estis “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”, do komune dividita de la 108-a UK kaj la 4-a VK.

Mi kore dankas al Thomas Bormann, kiu dum la 107-a UK en Montrealo, en 2022, akceptis la inviton esti la reĝisoro de la temo en 2023. Li tre fake kaj humane kunordigis la

laborojn, kies rezulton oni povos koni aŭ memori per tiu ĉi dokumentaro, kompilita de li kun la helpo de la prelegintoj.

La enhavo estas kleriga, kortuŝa, valora. Mi certas, ke ĉiuj, kiuj legos ĝin, akiros alian konscion pri la mondo kaj pri tio, kiel ni povas sinteni kaj labori por pli justa socio. Bonŝancaj estas ni, kiuj povas atingi tiun enhavon per Esperanto, lingvo, kiun ni elektis kaj al kiu kunfluis kaj kunfluas la plej altaj homaj valoroj, kiel tiuj de interkompreniĝo, solidareco kaj homamo. Ni ĝoju kaj el tio rikoltu la fortojn por esperi, ĉiam.

Fernando Maia Jr.
Vicprezidanto de UEA





108-a Universala Kongreso de Esperanto

Torino – Italio, 29-a de julio – 5-a de aŭgusto 2023



4-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

23-a ĝis 26-a de novembro 2023

Averto:

Tiu ĉi materialo estas neprofitocela sen-ISBN-a kompilo de dokumentoj, kun la sola celo registri kiel esperantistoj traktis la kongresan temon de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK). Ĝia distribuo estas elektronika kaj senpaga kaj havas la solan celon eduki la esperantistan komunumon pri tio, kion la diversaj prelegintoj prezentis dum la eventoj ĉirkaŭ la proponita temo.

Kompilinto:

Thomas Bormann, Reĝisoro de la Kongresa Temo

Prelegintoj kaj kunlaborintoj:

Gianfranco Cattai; Thomas Bormann; Giuliano Turone; Judith Jackson; Pascal Dubourg Glatigny, Catherine Gousseff, Javier Alcalde kaj Guilherme Fians; Raja Iftikhar; Manuela Ronco; Manuela Burghilea; Jeremie Sabiyumva; Amri Wandel; Costantine Mashauri; Marjolaine Bert kaj Ragnar Baldursson; Tea Turmanidze-Fabre.

Aliaj kontribuintoj:

Pier Luigi Cinquantini (tradukinto), Roman Dobrzyński (reĝisoro de dokumentfilmoj pri la brazila bienlernejo Bona Espero), Ursula Grattapaglia (ĉefgvidantino de Bona Espero), Anna Löwenstein (ĉefgvidantino de la informretejo UEA.facila), Patrick Morando (voĉleginto de la versio de la rezolucio en UEA.facila), teamo de UEA.facila, Kongresa Fakto de UEA, Loka Kongresa Komitato de la 108-a UK.

Kompostinto:

Fernando Maia Jr., 1-a Vicprezidanto de UEA, i.a. respondeca pri Kongresoj

Kovrilfoto: Anna Shvets/[Pexels](#)

Malantaŭkovrilfoto: Tima Miroshnichenko/[Pexels](#)

Enhavo

Enkonduko

Rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

Originala, en Esperanto

Traduko en la angla

Dokumentoj pri la prelegoj:

1. Enkonduka prelego de Gianfranco Cattai, Italio: Italio, elmigrado kaj enmigrado
2. Thomas Bormann, Germanio: 100 milionoj da rifuĝantoj tutmonde – kun aparta rigardo al la situacio ĉirkaŭ la Mediteranea Maro
3. Prof. Giuliano Turone, Italio: Mondvarmiĝo kaj migrado
4. D-ro Judith Jackson, Germanio: Sen migrado neniam evoluo – la kongresa temo “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj” el biologia vidpunkto
5. Pascal Dubourg Glatigny, Catherine Gousseff, Javier Alcalde kaj Guilherme Fians, Francio/Germanio/Katalunio/Britio: Geo-rakontoj: kartografio de transnaciaj migradpadoj
6. D-ro Raja Iftikhar, Italio: Pli ol 20-jara persona sperto kiel enmigrinto el Pakistano en Italio
7. Manuela Ronco, Italio/Slovakio: Interkultura volontulado en Torino: la sperto de la asocio ASAI
8. Manuela Burghilea, Rumanio/Britio: Romaoj de Rumanio, enlande kaj eksterlande: renkontoj kaj marĝena plurlingvismo
9. Jérémy Sabiyumva, Burundo: Sperto kiel migranto en D.R. Kongo kaj en Tanzanio
10. Amri Wandel, Israelo: Israelo kaj la juda enmigrado: de la komenco de cionismo ĝis nun
11. Costantine Mashauri, Tanzanio: Regionaj komunumoj en Afriko
12. Marjolaine Bert, Francio: EKO! – agado por kaj kun rifuĝintoj en Lesbos (Grekio), Marseille kaj Briançon (Francio)
13. Tea Turmanidze-Fabre, Kartvelio/Francio: Migradspertoj de kartvela esperantistino

Prezento de filmoj de Roman Dobrzyński pri Bona Espero en Brazilo

Aneksaĵoj:

Longa versio de la rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

UEA.facila: la rezolucio en facila lingvaĵo por lernantoj

Listo de kongrestemaj prelegoj en la 4-a VK

Kiel subteni Universalan Esperanto-Asocion (UEA)

Enkonduko

En ĉiuj epokoj de la historio homoj migris de unu regiono al alia, de unu lando al alia - ĉu por trovi lokon por kultivi teron kaj nutri sian familion, ĉu — en la nuntempo — por studi aŭ labori. Homoj kun diversaj kulturaj fonoj, kun diversaj gepatraj lingvoj kunvivas en sama loko, tiel homaj valoroj kunfluas kaj kontribuas al la pluevoluigo de socioj. Migrado estas inspiro, ne nur por la homoj, kiuj migras, sed ankaŭ por tiuj, kiuj renkontas la migranton kiel novan najbaron.

Multaj esperantistoj riĉigis siajn vivojn per propra migrada sperto. Jam la eklerno de la internacia lingvo Esperanto estas unua paŝo por esti preta renkonti homojn kun alia gepatra lingvo, alia kultura fono. Kelkaj esperantistoj elektis vivi en aliaj landoj kaj mem fariĝi parto de la socio kaj kulturo de la nova lando.

Samtempe, pli kaj pli ofte homoj estas devigataj forlasi sian hejmon. Ili fariĝas migrantoj kontraŭvole — pro milito, pro mizero, pro danĝero. Ili ne povas resti en siaj hejmlokoj, sed devas fuĝi. En la jaro 2022 la nombro de rifuĝintoj tutmonde unuafoje superis cent milionojn laŭ la statistiko de la UN-suborganizo por rifuĝintoj, UNHCR.

La urbo Torino estas taŭga gastiganto por tiu Kongresa Temo — en Torinon enmigris miloj da homoj por labori en la industriaj produktoj. Hodiaŭ vi renkontas multajn migrantojn el diversaj kontinentoj en la stratoj de Torino.

Pri tiuj temoj diskutis la 1323 partoprenantoj el 70 diversaj landoj, kiuj kunvenis en la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, plus 1282 personoj el 94 landoj aŭ teritorioj, kiuj aliĝis al la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto.

Thomas Bormann

Reĝisoro de la kongresa temo en 2023

Rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

Originala, en Esperanto

La 1 318¹ partoprenantoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado — kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniaj lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis — en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj — ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion;
2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon;
3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn;
4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj, ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado — migrado estas bazo por la evoluo de la homaro;

¹ Tiu ĉu nombro spegulas la nombron da aliĝintoj traktitan ĝis publikigo de la rezolucio dum la kongreso. Post fina traktado de ĉiuj aliĝoj la fina nombro envere estis 1323 aliĝintoj el 70 landoj.

5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948;
6. Nun, en la jaro de la 75-a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo, ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo;
7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj, kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, la 5-an de aŭgusto 2023

Resolution of the 108th World Congress of Esperanto, Torino, Italy

The 1318 participants in the 108th World Congress of Esperanto, meeting in Torino, Italy, from 29 July to 5 August 2023, addressed the topic “Immigration: The Confluence of Human Values.” The participants, attending from 69 different countries, not only discussed the topic, but experienced and lived it: because all participants spoke the international language Esperanto, no barriers of language prevented intercommunication and, in fact, in line with the congress theme, the human values of all participants intermingled in a harmonious atmosphere.

Many Esperanto speakers reported on their own experiences as migrants. They emphasized that knowledge of the Esperanto language helped them to receive support at the beginning of their new life, but that it was also essential to learn the national language of the country in question in order to integrate with society.

This was so for all migrants - whether they freely chose to move to another country or were obliged to leave their home country because of war, poverty or persecution.

Accordingly, the congress participants noted as follows:

1. The civil society of the host city of Torino provides a model example of the integration of migrants, and particularly refugees, in society;
2. With concern the congress participants noted that the number of refugees in the world in the past year has for the first time exceeded the figure of one hundred million. We point out that because of climate change more and more people are forced to leave their homes;
3. We call on all countries of the world to halt the causes of involuntary migration and we support the efforts of the United Nations and other international bodies to mitigate, if not to resolve, these problems;
4. We appeal to the states to which refugees turn to accept them and to give them all possible support to establish a free and independent life. We are convinced that migration ultimately yields a richer culture and a more prosperous society in these states themselves. We acknowledge the historical value of migration: migration is the basis for human development;

5. We call on all states to guarantee to migrants the possibility of life without linguistic discrimination or any other kind of discrimination. In short, we call on all states to follow the Universal Declaration of Human Rights proclaimed in the year 1948;
6. Now, in the year of the 75th anniversary of the Declaration of Human Rights, we note with concern that these rights are not respected in many parts of the world;
7. Therefore, we declare our solidarity with refugees and we emphasize that Human Rights are universal rights valid for every individual across the world, including migrants.

Torino, Italy, 5 August 2023

Dokumentoj pri la prelegoj:

1. Enkonduka prelego de Gianfranco Cattai, Italio: *Italio, elmigrado kaj enmigrado*

Italio, elmigrado kaj enmigrado

S-ro Cattai prelegis dimanĉon, la 30-an de julio 2023 en la itala. Jen traduko de lia manuskripto farita de Pier Luigi Cinquantini, dumviva membro de UEA:

Gianfranco Cattai, Torino

Prezidanto de C.I.C.S.E.N.E. kaj kunordiganto de Retinopera

C.I.C.S.E.N.E. → *Centro Italiano di collaborazione per lo Sviluppo edilizio nelle Nazioni Emergenti*
– Itala Centro pri Kunlaborado por la Antaŭenpuŝo de Domkonstruado en la Emerĝaj Landoj

Retinopera → Reto kuniganta pli ol 20 asociojn el la katolika mondo havantaj kiel komunan celon la konkretigon de la principoj kaj entenoj de la Socia Doktrino de la Eklezio

Italio, elmigrado kaj enmigrado

El migrada vidpunkto, Italio montriĝas esti tre aparta lando, ĉar dum ĝia historio ĝi spertis la du flankojn de la sama medalo: **fluoj antaŭe elirantaj kaj nun envenantaj**. Kvankam nuntempe ĝi estas deir- kaj alvenpunkto, Italio ne ĉiam estis fina haveno por miloj da eksterlandanoj serĉantaj pli bonajn vivkondiĉojn. Male, Italio estis ĉefe loko de foriroj kaj kortuŝaj adiaŭoj: estis la italoj, fakte, la protagonistoj de la plej granda elmigra eliro de la moderna epoko.

Ekde la unuigo de Italio (1861) kaj dum proksimume jarcento, estis vere tre multaj italoj devigataj forlasi sian hejmlandon por plibonigi sian ekonomian situacion aliloke. Pli precize, dum la tuta migradperiodo, estis ĉirkaŭ 24 milionoj da italoj, plejparte viroj kaj junuloj, kiuj forlasis Italion. **La lastaj jardekoj vidis Italion iĝi loko de enmigrado:** estas miloj da homoj, kiuj pro ekonomiaj aŭ politikaj kialoj alboridiĝis aŭ alboridiĝos en nia duoninsulo; traira aŭ cela lando, Italio nuntempe alfrontas la alvenon de multaj homoj.

Multaj demandas sin, kial Italio fariĝis loko de enmigrado. La kialoj estas multaj. **La unua estas pure geografia:** pro tio ke ĝi situas plejparte ĉe maro kaj preskaŭ tute formita de marbordoj, Italio estas ne tre kontrolebla. Malsame ol aliaj eŭropaj ŝtatoj, kiuj povas kontroli la alvenon de homoj ĉe la teraj landlimoj, nia lando ne havas la menciitan teritorian filtrilon. Due, pro tio ke ĝi situas meze de Mediteraneo, nia duoninsulo reprezentas la plej unuan (kaj plej facilan) limon transireblan por atingi Eŭropon. Resume, nia lando havas multajn trajtojn, kiuj favoris la pliiĝon de enmigrado, igante Italion eksterordinara kaj unika lando en la mondo el ĉi tiu vidpunkto.

Nia duoninsulo, koninte ambaŭ fenomenojn (elmigrado kaj enmigrado), estas klara ekzemplo de tio, kiel historio ĉiam estis karakterizata per cikloco. Cikloco, tamen, kiu hodiaŭ **devas trovi seriozan kaj efikan agadplanon por alfronti tion, kio hodiaŭ fariĝis vera solidareca kaj teritoria urĝaĵo.**

En Italio nuntempe la eksterlandanoj nombras inter 5,3 kaj 5,5 milionoj el kiuj 2,35 milionoj laboras.

La azilpetoj en kelkaj eŭropaj landoj en 2022 estis la sekvaj:

- Italio, 77 195
- Hispanio, 116 140
- Francio, 137 505
- Germanio, 217 735

Torino anticipis la tempojn

Enmigrado estas relative lastatempa fenomeno por Italio kaj por Torino.

Torino kaj ĝia civitanaro en la 90-aj jaroj (de la 20-a jc) **tre avangardis kaj pri la akcepto de enmigrintoj kaj pri interkultura dialogo**. Per pli profunda analizo de iuj iniciatoj, oni montros, ke Torino anticipis la unuan italan leĝon, kiu celis reguligi la enmigradon en Italion.

1983. Naskiĝas la oficejo por la eksterlandanoj. Urbestro Diego Novelli vokas Pastron Fredo Olivero'n por administri ĝin.

1994. C.I.C.S.E.N.E. aktivigas la Regionan Fonduson por la plibonigo de la loĝkondiĉoj de migrantoj. Ĝi estis la rezulto de kunlaboro kun la Piemonta Regiono kaj estis kunfinancita de Eŭropa Unio kaj kelkaj Piemontaj Komunumoj. La eksperimenta fonduso estis kultura kaj financa instrumento celita por faciligi la lueblecon de loĝejoj fare de eksterlandaj civitanoj, prenante sur sin la riskojn de la posedantoj kaj asocioj, kiuj agas kiel garantiantoj aŭ perantoj en la serĉado de lu-loĝejoj.

1995. Naskiĝas A.S.A.I. Interkultura Asocio por Edukado kaj Kulturo.

1996. Naskiĝas la Interkultura Centro de la Urbo Torino kun la celo oferti al Ĉiuj civitanoj, kaj denaskaj kaj enmigrintaj, ŝancojn por **interkultura trejnado** kaj ankaŭ okazojn por **renkontiĝo, dialogo kaj diskuto** pri komuninteresaj temoj kaj problemoj. La agadoj de la Centro estas kontrolataj de iu Scienca Komitato.

1998. Estas aprobita la Leĝo n-ro 40, kiu reguligas la enmigradon en Italion (ĝi estas konata ankaŭ laŭ la nomoj de la du geministroj, kiuj zorgis pri ĝi: Livia Turco kaj Giorgio Napolitano).

2002. Oni fondas FIERI kun la celo provizi ne nur Torinon kaj Piemonton, sed la landon entute, per esplorinstituto eŭroponivela kaj per iloj taŭgaj por trakti la migradan fenomenon, kiu en tiuj jaroj faris decidan salton antaŭen.

Torino ne eskapas el naciaj dinamikoj

Hodiaŭ Torino ne eskapas el la malfacilaĵoj, kiujn prezentas enmigrado je nacia kaj eŭropa nivelo.

1. Praktike **ni povas citi almenaŭ ses kialojn, pro kio oni ne pretas akcepti migrantojn**: preskaŭ manlibro de neakcepto. Kompreneble estas respondoj por ĉiu el la punktoj, sed bedaŭrinde ni havas limigitan tempon por trakti ilin.

- **Italio ne povas akcepti Ĉiujn.** Estas invado. La aliaj landoj de Eŭropo ne estas solidaraj.

lom pli supre ni legis la azilpetojn, kiuj kontraŭdiras ĉi tiun deklaron.

[Italio 77 195 - Hispanio 116 140 - Francio 137 505 - Germanio 217 735]

- **Ili ŝtelas laboron al niaj samlandanoj.**

Bedaŭrinde estas multaj laboroj, kiujn neniu el niaj samlandanoj emas plu fari.

- **Ili ne pagas impostojn**, ili ne kontribuas al niaj pensioj, ili preferas labori kontraŭleĝe...

...malgraŭ tio, ke la analizoj prezentitaj de la prezidanto de INPS (la Nacia Instituto, kiu liveras la pensiojn) diras: "Migrintoj savas niajn pensiojn".

- **Ili ne respektas niajn kutimojn kaj tradiciojn**: surstrate, en loĝejoj, kuirante.

Riĉiĝi danke al diverseco permesas eliri el limoj de nia "eta mondo".

- **Ni jam helpas ilin en iliaj landoj.**

En absolute nesufiĉa maniero. Laŭ sindevigo ĉe UNO, Italio devus investi 0,70% el MEP (Malneta Enlanda Produkto) ĉiujare, dum ĝi investas nur ĉirkaŭ 0,22%.

- **Ili povus pripensi antaŭ ol foriri** (frazo de nuntempa ministro).

Bedaŭrinde ili bone pripensis kaj malgraŭ ĉio ili decidis foriri.

2. La vera problemo estas, ke **mankis sekureca plano en la lastaj jaroj**. Giovanna Zincone (konsultistino de respublika prezidento kaj prezidanto de FIERI) en la dua raporto pri la integriĝo de la enmigrintoj en Italio, en 2001, skribis “La planado de politikoj en ĉi tiu areo devas konsideri la fakton, ke **enmigrado estas la koncentrilo de diversaj malsekurecoj, kaj en ĝi konverĝas, depende de la kunteksto, ĉiuj eblaj timoj de danĝeroj**, kiuj trafluas nian socion: de krimeco ĝis senlaboreco, ĝis ‘invado’, kiu perdigas sian identecon kaj siajn spacojn. La timo de enmigrado, tial, inkluzivas ian pli grandan postulon de sekureco, kiu koncernas la fizikan kaj socian transformon kaj reorganizadon de urboj kaj la kvaliton de homaj interrilatoj”.

3. Dua problemo estas, ke **Italio nek planis nek edukis al la akceptado**.

4. Ni estas objekte konvinkitaj, ke **la datumoj ne estas maltrankviligaj**.

- Torino maljuniĝas kaj perdas loĝantojn, la alveno de junaj migrantoj kaj grandaj familioj estas pozitiva kontribuo. Eksterlandanoj en Torino estas 14,9% el la loĝantaro.

5. **Tamen ne mankas malfacilaĵoj en la torina regiono en interrilatoj kun eksterlandanoj**. Jen du ekzemploj inter multaj:

- Sociloĝeja Institucio kaj Piemonta registaro estis kondamnitaj ĉar la konkurso por ricevi la loĝejojn diskriminacias eksterlandanojn.
- La (mem)riproĉo de la provinca poliestro: “la Oficejo pri enmigrado ne estas inda je ĉi tiu urbo”.

6. **Certe ne helpas oficialajn frazojn kiel**

- “etna anstataŭigo”, nericevebla koncepto, precipe se prononcata de ministro.
- “Atako kontraŭ Italio, alarmo ne ĉesas” legebla en gravaj torinaj ĵurnaloj.

Sed homaj valoroj restas

Homaj valoroj restas: Torino konkretigas spertojn de gastamo kaj solidareco.

1. **Iniciatemo ne mankas.** Jen du ekzemploj:

- Urbestro Lo Russo, lastatempe: en Torino estas 27.000 eksterlandaj neplenaĝuloj, **la strato estas la *lus scholae*** (rajto ricevi la civitanekon, kiam oni frekventis definitan kvanton da lernejaroj). *lus soli* (rajto ricevi la civitanekon aŭtomate se oni naskiĝas en iu lando) en Chivasso: honora civitaneco por eksterlandaj infanoj naskotaj en la urbo. La unua akto de la nova urba registaro parolas pri rajtoj kaj akceptado (la 16-an de julio 2022).
- La dommastroj luigas al eksterlandanoj: vidu la sperton de CICSENE. De 2002 ĝis hodiaŭ, CICSENE akompanis 2.400 familiojn, el t.n. Griza Zono, (t.e. familioj, kies enspezo estas tro alta por ricevi socian loĝejon sed tro malalta por lui apartamenton laŭ merkata tarifo) por subskribi kontraktojn rekte kun privataj posedantoj. 85% el tiuj estas eksterlandaj.

2. La engaĝiĝo de la Urbo kaj de la asocioj al la novaj civitanecoj estas tre forta:

- **Aliĝo al la metropola teritoria reto kontraŭ diskriminacio** kreita de la Urbo Torino (dekreto n.153/31977 de 15 decembro 2017).
- **Alvoko por superi la ekskludon de persona registriĝo** en la Torina komunuma registro. Estis subskribita de pli ol 120 Torinaj asocioj.
- Pri kultivado de akceptemo ni povas citi la **sperton de la COP**, asocio, kiu kunigas pli ol 30 asociojn/NRO (NeRegistaraj Organizaĵoj) engaĝitajn en Piemonto kaj en la devenlandoj: en Italio la temoj estas tiuj de lerneja kaj eksterlerneja edukado al la evoluo kaj kunvivado; en kromaj landoj, krom promocii iniciatojn kapablajn krei laborpostenojn kaj do esperon por junuloj, ili ankaŭ laboras pri migrado kaj pri la rajto migri, kaj pri la rajto ne migri.

3. **Homaj valoroj multobligas iniciatojn.** Fakte, estas multaj iniciatoj, kiuj ekestas spontane kaj kiuj estas antaŭsignoj de inkluziva kulturo. Ni citas du el ili kiel ekzemplojn:

- **Casa Aylan:** la sperto de Federico Maria Savia kaj Alice Arpaia, kiuj akceptas neakompanitajn fremdlandajn neplenaĝulojn. Familio preta akompani la gejunulojn, kiuj alvenis plej diversmaniere sed kun la sama bezono de hejmo, amo kaj interrilatoj sur kiuj konstrui sian estontecon.
- **Fratoj trans la maro,** solidarecaj koridoroj: ĝi eksperimentas kiel akceptemo eblas, estas kreema, kaj estas kontaĝa. Oni konstruas kune, paŝon post paŝo.

4. Konkludoj kaj proponoj eltiritaj el proponoj de M. Ambrosini (el lia verko: Sociologio de migradoj):

- **Necesas tutmonda aŭ almenaŭ eŭropa regado de migradoj: sekuraj kaj reguligitaj migradoj.**
- Distingi inter malsamaj tipoj kaj statusoj de migrantoj.
- **Establi laŭleĝajn kanalojn de eniro, kiuj estas pli avantaĝaj ol la neregulaj, evitante, ke azilo estu la sola enira kanalo.**
- Oni donu Restadpermeson por laboro al azilpetantoj, kiuj trovas laboron.
- Por la azilo: solidarecaj kanaloj, reloĝigoj, privataj sponsoroj.
- Adaptigi instituciojn, komunikadon, pensmanieron al la kosmopolitigo de la mondo: la mondo fariĝis pli granda ol niaj ideoj, ni bezonas ideojn kapablajn antaŭiri la nunan mondon.

5. Ni finas per **forta konvinko:** la estonteco certe estos malsama ol la pasinteco. Sufiĉas rigardi la eniron de la infanoj en la lernejo Parini en Corso Giulio Cesare. La estonteco apartenas al niaj gefiloj kaj genepoj kiel **Zeno**, naskita la 15an de januaro 2023 en Torino, kun patrino el Cuneo kaj patro el Niamey (Niĝero). Laika geedzeco, kiu sukcesis plifortigi la kristanajn kaj islamajn kredojn. Ŝi okupiĝas pri internacia kooperado kaj li pri akceptado de siaj samcivitanoj.

2. Prelego de Thomas Bormann, Germanio: 100 milionoj da rifuĝantoj tutmonde – kun aparta rigardo al la situacio ĉirkaŭ la Mediteranea Maro

100 milionoj da rifuĝantoj tutmonde – kun aparta rigardo al la situacio ĉirkaŭ la Mediteranea Maro

Prelego farita la 30-an de julio en Torino kaj la 23-an de novembro 2023 en la Virtuala Kongreso (re-spektebla en [UEAviva](#)²). Jen resumo kun statistikoj:

Thomas Bormann, Germanio

Nombro da rifuĝantoj tutmonde:

UNHCR (la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj for Rifuĝantoj) nombris 108 milionojn da rifuĝantoj tutmonde en la jaro 2022 - unuafoje la nombro superas 100 milionojn.

- 15 % pli ol en la jaro 2021
- nombro duobliĝis ene de 10 jaroj
- 42 % estas infanoj
- 58 % fuĝis ene siaj landoj
- *aparta rigardo al Ukrainio (laŭ UNHCR, junio 2023):*
 - 8,2 milionoj fuĝis al aliaj eŭropaj landoj
 - pli ol 5 milionoj fuĝis ene de la lando

Rifuĝantoj alvenintaj tra la Mediteranea Maro al Eŭropaj landoj inter januaro kaj junio 2023, laŭ UNHCR:

Konstante alvenas rifuĝantoj per boatoj al la bordoj de Eŭropaj ŝtatoj. Ili ekvojaĝas de la nord-afrika marbordo. Krimaj organizaĵoj organizas tiujn transportojn. La rifuĝantoj pagas al tiuj organizaĵoj altajn sumojn (proksimume po 1.000 eŭrojn persone, sed povas ankaŭ esti 4.000 eŭroj aŭ pli) por loko en boato; la krimuloj

² <https://www.youtube.com/watch?v=Ch3cCP4KvKI>

promesas transporton al Eŭropaj ŝtatoj evitante ĉian kontakton kun oficialaj limgardistoj. Tiel la rifuĝantoj klopodas atingi Eŭropan ŝtaton kvankam ili ne havas vizon por la koncerna ŝtato. La boatoj ĝenerale tute ne taŭgas por transmara veturo; tial miloj da rifuĝantoj mortas ĉiujare en la Mediteranea Maro, ĉar iliaj boatoj dronas kaj ne venas helpo. Tamen, miloj da rifuĝantoj atingas la bordojn de Eŭropaj ŝtatoj. Jen la precizaj ciferoj de la ses monatoj januaro ĝis junio 2023, kompilitaj de UNHCR:

- Italio 60 352
- Hispanio 12 115
- Grekio 7 763
- Kipro 1 857
- Malto 141

La rifuĝantoj startas la danĝeran vojaĝon trans la Mediteranea Maro en norda Afriko, plej ofte ĉe la marbordo de Libio aŭ Tunizio. Tamen, nur relative malmultaj rifuĝantoj venas el tiuj landoj. La plej multaj rifuĝantoj jam havas longan vojon malantaŭ si.

Jen statistiko, el kiuj landoj origine venas la 60 352 rifuĝantoj, kiuj atingis la italan marbordon inter januaro kaj junio 2023 - (laŭ UNHCR)

- Eurbordo 15 %
- Egiptio 12 %
- Gvineo 12 %
- Pakistano 10 %
- Bangladeŝo 10 %
- Tunizio 7 %
- Sirio 6 %
- Burkina Faso 4 %
- Kameruno 4 %
- Aliaj 19 %

Rifuĝantoj alvenintaj tra la Mediteranea Maro inter 2015 kaj 2022:

Jaro	Alvenoj	Mortis, pereis
2022	159 410	2 439
2021	123 318	3 231
2020	95 774	1 881
2019	123 663	1 510
2018	141 472	2 277
2017	185 139	3 139
2016	373 652	5 096
2015	1 032 408	3 771

La statistiko montras, ke en la jaro 2015 aparte multaj rifuĝantoj venis tra la Mediteranea Maro al EU. En tiu jaro aparte multaj homoj fuĝis el Sirio kaj Irako pro la milito kaj la bataloj en tiuj landoj. La plej multaj rifuĝantoj tiu-jare venis tra Turkio: de la okcidenta marbordo de Turkio ili plu-fuĝis en etaj boatoj al grekaj insuloj, kiuj troviĝas en vida proksimeco de la turka marbordo. Ekzemple, je la plej proksima punkto la greka insulo Samos troviĝas nur 1,7 kilometrojn for de la turka marbordo. En tiu jaro 2015 la rifuĝantoj plumigris de Grekio al mez-eŭropaj kaj nord-eŭropaj ŝtatoj, precipe al Germanio kaj al Svedio. Pluraj ŝtatoj en tiu jaro konstruis barilojn ĉe siaj limoj por ne enlasi rifuĝantojn, ekzemple Hungario aŭ Norda Makedonio.

Eŭropa Unio en junio 2023: Klopodoj limigi ne-laŭleĝan migradon

De post multaj jaroj Eŭropa Unio klopodas havi komunan politikon rilate al rifuĝintoj kaj azilo. Sed ĝis nun ĉiuj klopodoj atingi interkonsenton inter la 27 membro-ŝtatoj fiaskis. En somero 2023 la EU-komisiono lanĉis novan klopodon akiri interkonsenton. Jen la kernaj punktoj de la propono de EU-komisiono:

- Rifuĝintoj devas atendi azil-decidon en fermitaj centroj ĉe la EU-limo;
- Malakceptitaj rifuĝintoj povas esti re-portataj al “tria lando” (tra kiu ili venis);
- Akceptitaj rifuĝintoj estas distribuataj al ĉiuj 27 EU-landoj. Se lando ne akceptas, ĝi devas pagi po 20.000 eŭrojn por ĉiu malakceptita rifuĝinto.

Sed malkonsento en EU: 5 EU-ŝtatoj kontraŭas — daŭre ne ekzistas komuna azil-politiko de EU.

Eŭropa Unio en julio 2023:

Klopodo limigi ne-laŭleĝan migradon tra Tunizio

EU ofertas:

- Kontrakto kun Tunizio: EU ofertas ekonomian subtenon en alteco de 900 milionoj da eŭroj;
- Kondiĉo: Tunizio malebligas al migrantoj forlasi la landon per boatoj kaj Tunizio akceptas repreni migrantojn, kiuj jam atingis Italion.

Sed Tunizio hezitas interkonsenti tian kontrakton.

Jam ekzistas similaj kontraktoj inter unuopaj EU-ŝtatoj (Hispanio, Italio) kaj Afrikaj ŝtatoj pri repreno de migrantoj kaj pri subvencioj por plifortigi marbordan policon, sed apenaŭ ekzistas kontaktoj aŭ interkonsentoj pri migrado inter Eŭropa Unio kiel tuto kaj aliaj ŝtatoj.

Tamen, unufoje Eŭropa Unio sukcesis akiri interkonsenton kun najbara ŝtato rilate al rifuĝintoj, nome kun la Respubliko Turkio.

Marto 2016: Kontrakto inter EU kaj Turkio:

1. Turkio reprenas ĉiujn rifuĝintojn de Grekio, kiuj atingis la grekajn insulojn per ne-laŭleĝa vojo (kutime migrantoj venis en gum-boatoj)
2. Rekompense, por ĉiu unuopa rifuĝinto el Sirio, kiun Turkio reprenas de Grekio, Eŭropa Unio akceptas unu sirian rifuĝinton el Turkio. Turkio rajtas elekti, kiuj siriaj rifuĝintoj rajtu translokiĝi al EU;
3. En Turkio vivas pli ol 3 milionoj da rifuĝintoj el Sirio. Eŭropa Unio transprenas parton de la kostoj por subteni tiujn rifuĝintojn - planita sumo pagenda ĝis 2020: 6 miliardoj da eŭroj.

Punktoj 1 kaj 2 apenaŭ funkciis kaj estis suspenditaj de Turkio en februaro 2020; punkto 3 fakte estis plenumita kaj eĉ daŭrigita: ĝis la jaro 2023 EU pagis ĉirkaŭ 10 miliardojn da eŭroj por rifuĝintoj el Sirio en Turkio, ekzemple por konstrui malsanulejojn por siriaj rifuĝintoj aŭ lernejojn por la ĉirkaŭ 700.000 siriaj infanoj en Turkio, kiuj estas en la aĝo por ricevi lernejan edukon.

Daŭre Eŭropa Unio ofertas monon al Turkio por ke la siriaj rifuĝintoj povu dece vivi en Turkio, sed Eŭropa Unio malakceptas la postulon de Turkio, ke pli da siriaj rifuĝintoj povu translokiĝi al EU-ŝtatoj. Turkio komencis resendi siriajn rifuĝintojn al Sirio, precipe al siriaj teritorioj kontrolitaj de la turka armeo. La turka registaro anoncis, ke ĝi intencas resendi la plejmulton de la siriaj rifuĝintoj, kvankam kelkaj el ili jam dum 12 jaroj vivas en Turkio.

Samtempe multaj rifuĝantoj el aliaj landoj venadas al Turkio, plej multaj kun la deziro plu-migri al Eŭropa Unio.

Kiel Eŭropa Unio povus reagi al tiu deziro, por ne paroli pri premo, de rifuĝantoj, kiuj volas por si establi novan vivon en Eŭropa Unio?

Kion fari? - tri alternativoj

1. malfermi limojn kiel en 2015;
2. fermi limojn, konstrui murojn, perforte repuŝi migrantojn;
3. duflankaj kontraktoj pri migrado inter eŭropaj ŝtatoj kaj afrikaj ŝtatoj (kaj aziaj):
 - a. Eŭropa ŝtato ebligas laŭleĝan migradon en limigitaj nombroj por studentoj, laboristoj;

- b. Afrika ŝtato garantias repreni ĉiun el siaj civitanoj, kiuj atingis la eŭropan ŝtaton per ne-leĝa vojo.

Alternativo 1: Nerealisma, povus gvidi al konfliktoj, eĉ civilaj militoj. Pluraj registaroj de membro-ŝtatoj de EU klare rifuzas akcepti rifuĝantojn kaj estas subtenitaj de plimulto de la balotantoj. En multaj Eŭropaj ŝtatoj kontraŭ-migradaj partioj estas tre sukcesaj.

Alternativo 2: Kontraŭ Homaj Rajtoj kaj nerealisma. Neniu ŝtato ĝis nun atingis la celon ne enlasi iun ajn rifuĝanton.

Alternativo 3: Tiu ŝajnas esti la sola realisma alternativo, sed ĝi ne estas aplikebla por multaj rifuĝantoj, ekzemple tiuj kiuj fuĝis de la milito en Sirio - ne estas imageble fari kontrakton kun la registaro de Sirio pri repreno de rifuĝantoj.

Sekve, estas tre malfacile trovi respondon al tiu demando: “Kion fari?”

Simila prelego troviĝas ankaŭ en la jutubkanalo de la Londona Klubo, okazinta la 7-an de julio 2023:

<https://www.youtube.com/watch?v=bfxYVnqWB0>

Ĉiuj registritaj prelegoj de la 108-a UK kaj de la 4-a VK troviĝas ankaŭ en la jutubkanalo de UEA:

<https://www.youtube.com/ueaviva>

3. Prelego de Prof. Giuliano Turone, Italio: *Mondvarmiĝo kaj migrado*

Mondvarmiĝo kaj migrado

Manuskripto de la prelego de la 30-a de julio 2023:

Giuliano Turone, Italio

Giuliano Turone estas emerita juristo, profesoro, aŭtoro. Li estis juĝisto ĉe la kasacia kortumo en Milano, Italio. Kune kun kolego li gvidis la esplorojn, kiuj kondukis al la aresto de estro de la krima organizaĵo Cosa Nostra. Poste li estis prokuroro ĉe la Internacia Pun-Tribunalo por Eksa Jugoslavio en Hago, Nederlando. Li estas ano de la Honora Patrona Komitato de UEA.

La fenomeno de migrado de homoj de unu regiono al alia de la planedo estas kontemplebla el diversaj vidpunktoj. Por simpligi la aferon, ni diru, ke ekzistas la vidpunkto de tiuj, kiuj loĝas en la “regionoj de foriro” kaj tiu de tiuj, kiuj loĝas en la “regionoj de alveno”. La vidpunkto de la unuaj estas – kaj ĉiam estos – la sama, ligita al la neeblo transvivi en la regionoj de foriro. Anstataŭe, la vidpunkto de la duaj varias depende de tio, ĉu la regiono de alveno sentas aŭ ne sentas la bezonon de novaj laborantoj kaj novaj generacioj. Tial la vidpunkto de la homoj, kiuj loĝas en eblaj alvenaj regionoj, povos varii de maksimuma akcepto ĝis maksimuma rifuzo. Nu, la venontaj klimatsanĝoj neeviteble pliigos supermezure la fenomenon de migrado, kaj ili praktike malebligos la totalan fermon de iu ajn regiono de alveno, escepte se ĝi estas regiono sen maraliroj, kies loĝantoj decidus elekti preskaŭ-suicidan solvon: konstrui nesupereblan muron en kiu sin enfermi.

Ni finfine jam bone scias, kaj eĉ fizike spertas, ke la tielnomata mondvarmiĝo estas tre grava problemo de nia planedo. Kaj ni ankaŭ scias, bedaŭrinde, ke la temperaturaj plialtiĝoj en la lastaj jardekoj estis pli rapidaj kaj por ni pli ĝenaj ol la antaŭaj.

Krome, ni ankaŭ scias, finfine, ke la fundamenta kaŭzo de ĉi tiu varmiĝo ne estas natura kaŭzo, sed ĝi dependas de niaj ellasoj de forcej-efikaj gasoj kiel karbona dioksido. Kaj estas ni homoj, kiuj kaŭzas ĉi tiujn emisiojn: ili devenas esence de ia

homa evoluo, bazita sur fosiliaj bruladoj, gravaj senarbarigoj, kaj nedaŭrigeblaj aktivecoj de intensa agrikulturo kaj bestbredado.

Do ni ofte aŭdas pri varmegaj ondoj, longedaŭraj sekecoj, ekstremaj eventoj kun tre forta pluvo-kvanto, kiel uraganoj kaj tajfunoj. La tuta mondo estas trafita de la diversaj fenomenoj asociitaj kun la klimata ŝanĝiĝo, sed la pli-malpli negativaj efikoj dependas ankaŭ de la vundebleco de la teritorioj; ili dependas ankaŭ de la malforteco de la ekonomioj; la malforteco de la sociaj strukturoj...

Plej multe suferos la landoj kun tre fragilaj ekonomiaj kaj sociaj strukturoj.

Tiusence, kompreneble, Afriko aperas kiel ekstreme delikata kontinento, areo, kie klimata ŝanĝiĝo povas pligrandigi problemojn, kiuj jam estas endemiaj. Afriko estas kontinento, kie la konsekvencoj de klimata ŝanĝo povas superi la sojlojn de vivebleco kaj supervivo. Kaj ĉio-ĉi ofte kontribuas al konfliktoj kaj migradoj.

Jen ni alvenis al la temo *migradoj*.

Oni nepre devas substreki, tamen, ke la afrikaj landoj kaj iliaj loĝantoj preskaŭ neniom kontribuis al la naskiĝo de tiuj ŝanĝoj: historie, iliaj ellasoj de karbona dioksido kaj aliaj forcej-efikaj gasoj ĉiam estis ege malaltaj. Imagu, ke nur Sudafriko superas unu procenton de la totalaj mondaj ellasoj. Evidente, tio ekigas problemon de internacia egaleco: tiuj, kiuj estas malpli respondecaj suferas anstataŭe la plej gravajn sekvojn de la tutmonda varmiĝo, certe pro la fragileco de la ekonomioj, sed ankaŭ pro la proprecaj karakterizaĵoj de la afrika klimato.

Ni do mallonge analizu kiel la klimataj ŝanĝoj de la mondvarmiĝo agas en la aparte delikataj lokoj de la afrika kontinento,

Antaŭ ol la mondvarmiĝ-problemo manifestiĝis, la normala ŝablono de temperaturoj kaj de pluvokvanto en Afriko, almenaŭ en la tropikaj kaj subtropikaj zonoj, estis karakterizita de relative alta temperaturo, jes, sed ankaŭ de relative malalta temperatura etendiĝo, ne nur inter tago kaj nokto, sed ankaŭ inter somero kaj vintro. La pluvoj, siavice, ĉiam koncentriĝis en la tiel nomata "pluvsezono".

Sekve, plantoj, bestoj, kaj eĉ homoj, kiuj loĝas en ĉi tiuj areoj, adaptiĝis al ĉi tiu klimato kun preskaŭ konstantaj temperaturoj. Do ia ajn signifa varmega ondo povas kaŭzi multe da damaĝoj, eĉ superante la fiziologiajn termikajn toleremajn sojlojn.

Oni dokumentis lastatempe grandan kreskon de varmegaj ondoj en Afriko kaj ilia intenseco estas atendita pliiĝi, se ni malsukcesos ĉesigi la mondvarmiĝon. Ĉio ĉi, kune

kun eblaj longedaŭraj sekecoj, povas konduki al egaj malfacilaĵoj en kultivado, do al malsato, al konfliktoj kaj - denove - al migradoj.

La plejmulto de la migrantoj vojaĝantaj laŭ la mediteranea itinero alvenas al Italio de la granda Sahela areo, kiu situas sude de la Sahara dezerto. La Sahelo inkluzivas plurajn delikatajn landojn, inkluzive de Gambio, Senegalo, Malio, Burkino, ktp. Tie, la plialtiĝo de temperaturoj kaj la ŝanĝo de la pluvsezono produktas gravan dezertiĝon. Fekundaj grundoj degradas kaj akvoresursoj ĉiam pli kaj pli malpliigas. Do, la krizoj - en jam fragilaj landoj - draste pligraviĝas.

En tiu ĉi situacio Eŭropo staras pli-malpli inerte antaŭ la migranta fenomeno ligita al tiuj krizoj. Kaj ni tre bone konscias pri la egoisma tento de multaj eŭropanoj... enŝlosi sin hejme... konstrui murojn... konstrui murojn ĉirkaŭ si... enmurigi sin... Jen la solvo al la problemoj, laŭ kelkaj homoj.

Sed kial konstrui murojn?... Kial enŝlosi sin ene de muro?... *Ĉu iu ĉi tie volas fermi sin mem ene de ĉirkaŭa muro?... Ĉirkaŭa!!!... Ĉirkaŭa!!!... Kial enŝlosi sin!?!...*

Aliflanke, la lastatempa granda kresko de varmegaj ondoj en Afriko kaj ilia intenseco faros la afrikan kontinenton ĉiam pli nevivebla kaj rapide *kaj eksponente* pliigos la enmigradon el Afriko al Eŭropo.

Ĉi tio faros ajnan muron tute senutila. Krom se ĝi estas tre alta muro... Krom se ĝi estas vere hermetike fermita muro... Eĉ se temas pri centprocente fermita muro sen ia ajn TRUO, kiu ebligu eniron aŭ eliron je tiu lando.

Sed tio estas, cetere, absurda hipotezo: ĉar la loĝantoj enterigitaj vivaj en tia hipoteza fermita lando, (evidente sen aliro al la maro), ne havus estontecon. Ili malaperus, kiel iu ajn homo dumvive murigita.

Aliflanke, kiel ni povas pensi, ke amasaj fuĝoj povus malpliigi, se ilia kaŭzo estas la kreskanta neeblo vivi en la originaj landoj? Ĉi tie en Eŭropo ni ŝajnigas ne scii tion, sed ĉiutage la homamasoj, kiuj fuĝas de Sahelo por trairi la dezerton piede, malgraŭ la alta risko morti pro malsato, soifo kaj varmo, ĉiam kreskas. Multaj mortas en dezerto pro dehidratigo, tamen la senesperaj fuĝoj ne malpliigas.

Nu... Vi eble scias, ke antaŭ unu monato okazis renkontiĝo en Bruselo, ĝuste pri la temo de migrantoj, inter la prezidantoj de Italio, Pollando kaj Hungario: Meloni, Mazowiecki kaj Orbán.

Temis pri iom groteska renkontiĝo, ĉar pri la temo de migrantoj la tri prezidantoj pensas tute same, do ili ŝajnigas sin grandaj geamikoj, sed ili neniam trovas la plej etan interkonsenton inter ili.

La sola, kiu konsideras la ideon de la muro, estas Orbán, sed en Bruselo li eĉ ne kuraĝis paroli pri tia ideo. Mazowiecki simple diris, ke li jam prizorgas la ukrainojn. Kaj Giorgia Meloni revenis hejmen sen atingi neniun rezulton.

Ja, la itala politiko estas ege konfuza pri la temo de migrantoj, kiuj ĉiutage alvenas al la sudaj marbordoj.

Italio daŭre konsideras la tre ege multajn junulojn de enmigrantaj familioj kiel “fremdulojn”, kaj daŭre rifuzas agnoski ilin kiel italaj civitanoj, eĉ se ili estas itallingvaj denaskaj parolantoj, kiuj daŭre kreskas kaj daŭre kreskos en sia teritorio, kiel dua kaj tria generacio. Tio nur kaŭzos, iom post iom, nekontroleblajn kaj katastrofajn damaĝojn. La sekvo de tiuj katastrofoj estos, ke la reziduaj kaj ĉiam pli kaj pli maljunaj originalaj italoj transformiĝu al iuspeca minoritata tribo, enŝlosita ene de muro virtuala, eĉ pli malagrabla ol la fizika muro.

Tamen, ekzistas multe pli inteligenta solvo ol ŝlosiĝi ene de muro por ĉiam: sendepende de ĉu ĝi estas virtuala muro aŭ fizika muro.

La iniciaton proponis aŭtoritataj klimataj fizikistoj kaj mi legis ĝin en artikolo far Antonello Pasini. La propono estas kontribui ĉiuj kune, al solvado de klimataj problemoj, konfliktoproblemoj, migrantaj problemoj. Kontribui ĉiuj kune, per utilaj agoj: agoj utilaj por ambaŭ Eŭropanoj kaj Afrikanoj.

Pli precize, oni proponas la reakiron de degraditaj kaj dezertigitaj teroj en la vasta regiono de la Sahelo. Retransformi ilin al paŝtejoj, al arbaroj, al daŭrigebla agrikulturo. Tiamaniere ni farus bonon por la klimato, ĉar tiuj teroj denove sorbus karbonan dioksidon. Ĉi tio reduktus hejtadon kaj alportus bonstaton al la homoj, kiuj loĝas en tiuj lokoj. Tiel oni povus reveni al nova agrikulturo, kiu konduku al komerco kaj stabileco. La kostoj por tia laboro estus tre malalta, kaj la rezultoj estus tre ege valoraj.

Ni neglektu la murojn kaj adoptu la internacian kunlaboron.

4. Prelego de D-ro Judith Jackson, Germanio: *Sen migrado nenia evoluo – la kongresa temo “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj” el biologia vidpunkto*

Sen migrado nenia evoluo – la kongresa temo “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj” el biologia vidpunkto

Resumo de la prelego de la 1-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](#)³):

D-ro Judith Jackson, Germanio

Judith Jackson estas doktoro pri biologio, ŝi laboras kiel instruisto por biologio, kemio kaj teatro por adoleskantaj infanoj en lernejo en Frankfurto.

Migrado estas deĉiama kaj eterna monda fenomeno. Plantoj, bestoj kaj aliaj vivaĵoj ĉiam esploris novajn teritoriojn - akvajn jam pli longe ol terajn. Ĉu tiu migrado iel damaĝis al la vivo sur la planedo? Aŭ ĉu migrado ne eble estas esence necesa por la evoluo?

La prelego sekvas la kvar terminojn de la Kongresa temo: Migrado, kunfluo, homoj, valoroj. La prelego prilumigas ĉiun terminon el biologia vidpunkto.

Migrado estas ordinara okazaĵo en ĉiutaga biologio. Pensu pri la gnuoj kaj zebroj en Tanzanio, kiuj migras ene de la Serengeti-parko (fig. 1).


Ekzistas multaj ekzemploj de tia migrado: Monarkaj papilioj transflugas la golfon de Meksikio. Marbestoj kiel ĝibaj balenoj transnaĝas la Atlantikon. Multaj birdoj flugas rekordajn distancojn de unu poluso al la alia kaj reen (fig. 2).

³ <https://www.youtube.com/watch?v=BAXXcVZsmTs>

ekologia migrado

Nacia Parko Serengeti

ĉiujara migrado:
1 500 000 gnuoj
250 000 zebroj



Figuro 1.



11,000 km
de Alasko ĝis Novzelando
Lapona limozo
Limosa lapponica


Arkta ŝterno
Sterna paradisaea
de Arkto al la
Antarkto kaj reen



Figuro 2.

Ofte la homo ludas rolon en besta aŭ planta migrado, blokante riverojn, aŭ, antaŭ kvin jarcentoj, per la “Koluma interŝanĝo” inter la kontinentoj Ameriko kaj Eŭropo. Multaj bestoj, plantoj, fungoj aŭ bakterioj migras per volontula aŭ akcidenta helpo de homoj (fig. 3).

la Koluma interŝanĝo



Figuro 3.

Ekzemple: Kanbufo metita intence en Aŭstralion en la jaro 1935 por forvori pestan skarabon kreis ekologian katastrofon, kiu daŭras ĝis hodiaŭ. Simile Kaŭri-arboj en Nov-Zelando ne havas defendo-mekanismojn kontraŭ nove enmigrinta fungo (“Oomyceto”). Tiu mikroskope eta funga vivaĵo enmigris en la sulkoj de ŝu-plandoj de turistoj (fig. 4).

La fenomeno de migrantaj specioj pliiĝas, kiel britaj sciencistoj pruvis per superrigardo, kiu observis la insulon ekde la 1960-aj jaroj.

Homoj mem de ĉiam daŭre migris. Paleogenetiko helpas sekvi la spurojn de fruaj hominidoj sur la kontinentoj.

Krome, migri estas homa trajto en iomete alia maniero: adoleskantoj migras en la tempo! Ilia veka periodo malfruiĝas tra la tenaĝera fazo kaj tiel ili distancigas sin de la ĉirkaŭaj plenkreskuloj. Tiu konduto ne estas spita, sed biologie kontrolita per la hormone melatonino. Estas komuna trajto de sociaj bestoj, kiuj vivas en grupoj, kiel la homoj: necesas, ke adoleskantaj individuoj forlasas la parenkan grupon por eviti en-bredadon. Unu el la seksoj devas migri kaj trovi kaj membriĝi en nova grupo.

enmigrado flaŭro kaj faŭno

enmetitaj specioj

kanbufo
Rhinella marina



kanbufo: migras tra Australio de 1935



akcidente enmetitaj specioj



rato
Rattus

invadaj specioj



zebra mitulo
Dreissena polymorpha

Figuro 4.

“Kunfluo” estas principo, kiu ofte aperas en biologio. La sinteza evoluisma teorio, kiu kunfandas la ideojn de Darwin kun la eltrovojn de Mendel, montras tion. Variado estas la “celo” por sukcesa evoluo, do kunfluo de genoj kaj mutacioj enebligas respondojn al ŝanĝantaj medioj. Havi du seksojn helpis pliigi la variadon pere de rekombinado. Organismoj havante du kopiojn de geno, do du diversajn alelojn, povas efike miksi genetikajn informojn. Tiel vivo povas pli sukcese reagi al selekcio.

Homoj daŭre evoluas. (Kien iras nia specio? Eble al trans-humanismo?) Tion oni povas esplori tra posedo aŭ neposedo de saĝdentoj, por kiuj pro ŝanĝo de vizaĝo kaj cerbo ne plu estas sufiĉe da spaco en nia makzelo. Pli da vizaĝo faris nin samtempe esti ekspertoj pri vizaĝ-esprimoj.

Ni estas socia organismo kaj nepras, ke ni povas legi unu la alian. Eksperimento enmetis ridetantajn aŭ ĉagrenajn vizaĝ-esprimon meze en filmetoj pri pejzaĝo, sed nur mili-sekundojn, tiel ke la provuloj ne konscie vidis ajnan vizaĝon. Tamen, la mezuritaj rezultoj klare montris, ke ridetanta vizaĝo, subkonscie vidita, plibonigis la fartojn de provantoj kaj inverse (per ĉagrena vizaĝ-esprimoj). Ankaŭ estis mezurite, ke ni imitas la esprimon de nia vidalvidulo. Tiel ni sentas pli facile kiel kunuloj fartas.

Homoj ĉiam vivas en grupoj - kaj aparteni al grupo estas esenca por la vivo de ĉiu individuo. En pratempo la grupoj konsistis el po ĉirkaŭ 150 membroj.

Infanoj en eksperimento dum somera lernejo estis disigitaj en du grupojn: la anoj de unu grupo ĉiam surhavis bluan t-ĉemizon, la anoj de la alia grupo ĉiam portis ruĝan t-ĉemizon. Jam tio sufiĉis, ke la infanoj sentis sin pli pozitivaj en la grupo kun la propra koloro (fig. 5).



Figuro 5.


Aparteno al grupo estas tiel grava, ke eĉ sen iaj komentoj pozitivaj aŭ negativaj, fare de plenkreskuloj (en tiu ĉi eksperimento la plenkreskuloj estis sciencistoj) formas opinion. Tiu opinion, tamen, estas influebla, formebla. Do indas proponi tre diversajn grupojn, al kiuj homoj povas aparteni.

Ĉu “valoroj” estas alrigardeblaj el biologia vidpunkto? Jen plia eksperimento: Oni demandis al diversaj personoj: en kia mondo, vi taksas, vivas ni? Post aviadila kraŝo - ĉu regas la leĝo de la pli forta aŭ ĉu oni kondutas civilizacie kaj helpas al malfortuloj? 97 % da homoj respondas, ke oni kondutos egoisme. Sed tiel fakte ne estas. Sciencaj esploroj pri katastrofoj montras, ke homoj helpas unu al la alia. Se vi demandas heroon, kiu savis fremdan infanon dronantan en sovaĝa rivero: Kion vi pensis dum la savo? - La respondo certe estos: Mi ne pensis, mi simple faris. Do, la savo okazis kvazaŭ aŭtomate, ĉar homoj helpas unu al la alia.

Homaj valoroj estas eĉ universalaj. Beboj en aĝo de tri monatoj preferas pupojn, kiuj helpas al alia pupo. Tion oni mezuras per la tempo de alrigardo al la “bona” aŭ “malbona” pupo fare de la bebo. Do, bebetoj preferas helpemajn aliulojn!

Ni devas nur pretervenki la problemon, ke ĉiu preferas pupojn aŭ homojn de la propra grupo, tio ankaŭ validas por beboj.

Estas biaso: homo preferas grupanon al fremdulo. Kontraŭ tio helpas kontakto al anoj de alia grupo. Multaj kontaktoj kun homoj el supozite fremda grupo, ekzemple en laborloko, helpas malkonstrui antaŭjuĝojn. Ankaŭ Zamenhof konstatis tion kaj kreis por ni lingvon internacian (fig. 6).



Figuro 6.

Diskutante, ke migrado estas ia “problemo”, ni nun konstatas, ke migrado estas normalaĵo, fakto. La problemo kuŝas pli en la engrejnita deziro al distingo de propra kaj fremda grupo. La deziro aparteni al iu grupo kaj preferadi tiun al fremda grupo. Ni devas unue esti klaraj pri tio. Kion ni faras - preskaŭ aŭtomate. Ni devas detekti tiun biason, kiam ni sentas aŭ aŭdas pri ĝi. Ni devas averti, kiam ni rimarkas ĝin.

Stereotipoj kaj de-homigo estas alarm-signaloj. Ni devas kontraŭstari tiajn tendencojn. Kaj cetere: ni havas cerbon, kiu kapablas racioni, do ni povas elteni migradon kaj pozitive influi la kunfluron de - universalaj - homaj valoroj.

5. Prelego de Pascal Dubourg Glatigny, Catherine Gousseff, Javier Alcalde kaj Guilherme Fians, Francio/Germanio/Katalunio/Britio:
Geo-rakontoj: kartografio de transnaciaj migradpadoj

Geo-rakontoj: kartografio de transnaciaj migradpadoj

Resumo de la prelego de la 31-a de julio 2023:

Pascal Dubourg Glatigny (CNRS, Parizo), Catherine Gousseff (CNRS, Parizo), Javier Alcalde (Universitat Autònoma de Barcelona) kaj Guilherme Fians (St. Andrews University)

Ĉe la krucvojo inter antropologio, sociologio, politika scienco kaj historio, Geo-rakontoj intencas konigi kaj pristudi la specifecon de migrintaj intelektuloj, sciencistoj kaj artistoj. Nia celo estas analizi kaj reprezenti iliajn vojaĝojn en nova maniero per rakontaj mapoj videbligante ilian itineron kaj aŭdigante ilian voĉon. Tiu projekto nun malfermiĝas al la esperanto-komunumo kaj serĉas kontribuontojn por pli bone fokusi pri la percepto de lingvaj problemoj en la migra procezo kaj elmontri la specifecon de la esperanto-komunumo (fig. 1).

Geo-rakontoj celas kolekti konojn pri la migraj padoj de sciencistoj, artistoj kaj intelektuloj vivintaj en kunteksto de danĝero (militoj, diktatoraj reĝimoj, personaj persekutoj, ktp.) ekde la komenco de la 20-a jarcento ĝis hodiaŭ (fig. 2).

La retejo proponas novigan reprezenton per rakontaj mapoj, kiuj ebligas interaktive lokigi vivrakontojn. Elirpunkto estas la diverseco kaj diseco de lokoj, la interkonektiĝo. La analizo de ĉies trajektorioj ebligas kapti la specifecon de diversaj migradpadoj.

Konsiderante la variajn historiajn kaj sociajn kuntekstojn, geo-rakontoj revortumas la demandon, kion signifas la ekzilo.

comprendre

I'EXIL

MIGRATIONS

Géo-récits vous fait parcourir les trajectoires des scientifiques, artistes et intellectuels exilés originaires de différentes régions dans le monde.



Accédez à la carte



Figuro 1. <https://bit.ly/georecits>




Figuro 2.

Geo-rakontoj sekvas kunlaboran modelon per enmapigo de datumoj kolektitaj de multaj esploristoj tra la mondo, arkivoj sed ankaŭ de ia ajn alia fonto ebligante spuri la migran realon de ekzilitoj.


Unu ekzemplo el Geo-rakontoj

En Geo-rakontoj ĉiu ĉapitro de la viv-rakonto ligiĝas al iu loko videbla sur la mapo. En tiu loko oni povas ankaŭ vidi alies viv-rakontojn de tiuj, kiuj iam estis aŭ trapasis la lokon (fig. 3).

En Geo-rakontoj al la teksto aldoniĝas ankaŭ bildoj aŭ viv-dokumentoj kaj al la esperantaj viv-rakontoj aldoniĝos ankaŭ sondokumentoj, tiel ke aŭdiĝu ankaŭ la lingvo kaj voĉo de la kontribuantoj (fig 4).



Figuro 3.



Figuro 4.

6. Prelego de D-ro Raja Iftikhar, Italio: *Pli ol 20-jara persona sperto kiel enmigrinto el Pakistano en Italio*

Pli ol 20-jara persona sperto kiel enmigrinto el Pakistano en Italio

Notoj kaj bildoj de la prelego de la 1-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](#)⁴):

D-ro Raja Iftikhar, Italio

ANTAŬ-ELMIGRADO

- Doktorpri Homeopatia Medicino 1993
- Instruisto en Kolegio 1993 – 1997
- Kunvenoj kaj seminarioj pri homeopatio
- Politika Aktivisto



03/11/2023

1998: Enmigrado en Italio;

2012: Translokiĝo al la urbo Padova;

2021: Politikaj aktivecoj.

Enmigrado por mi estis renaskiĝo.

⁴ <https://www.youtube.com/watch?v=eylZJwovPRw>

ADAPTIGO EN ITALIO

- Laboroj en diversaj industrioj : fabrikoj, restoracioj,
- Laboro en la jurisdikcio kiel interpretisto kaj traduktisto
- Lernado de la itala lingvo kun la helpo de Esperanto
- Obtento de diplomo de Itala Meza Lernejo
- Majstro en Komerco kaj Ekonomio
- Majstro en Naturala Kurac-Metodoj



03/11/2023

KLOPODO KIEL TURISMA AGENCIO 2006- 2011

- komenci kiel turisma agencio
- La leciono:

Kiam ni volas , ni povas fari



03/11/2023

“Projekto Ponte”: kulturo kaj historio faras ponton tra homoj en 2006;

2005 ĝis 2010: instruado de itala lingvo por eksterlandanoj;

2012: Re-fokusiĝo al homeopatio, nun sciencisto en farmacia kompanio.

KARIERO KIEL POLITIKA AKTIVISTO EN PADOVO

- Elektiĝo kiel Membro de la Komisiono por Eksterlandanoj Padovo
- 16 membroj de 12 landoj por reprezenti eksterlandanojn

Elektiĝis kiel Prezidanto de la Komisiono kiu reprezentas 38.000 eksterlandanojn



03/11/2023

MEMBRO DE LA URBA KONSILIO KAJ REPRESENTANTO DE 38 MIL EKSTERLANDANOJ EN LA URBO PADOVO



GASTIGANTAJ URBOJ

REPRESENTANTOJ DE 60 URBOJ SUBSKRIBIS PROJEKTON POR GASTIGI RIFUĜANTOJN EN LOKAJ FAMILIOJ



7. Prelego de Manuela Ronco, Italio/Slovakio: *Interkultura volontulado en Torino: la sperto de la asocio ASAI*

Interkultura volontulado en Torino: la sperto de la asocio ASAI

Resumo de la prelego de la 1-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](#)⁵):

Manuela Ronco, Italio/Slovakio

Enmigrado iĝis jam stabila elemento en la riĉaj socioj kaj kun ĝi necesas kunvivi.

La socia inkluzivigo de la enmigrintoj estas defio, kiun la publika sistemo de bonfaro daŭre ne sukcesas alfronti en taŭga maniero.

Tiel ĝi estas unu el tiuj kampoj en kiuj la 3a sektoro havis plejparte rolon de anstataŭado kaj kompensado.

ASAI estas asocio de interkultura edukado kaj volontulado, kiu ekde 1995 funkcias en Torino.

Ĝia nomo, origine akronimo de Asocio Salesiana de Interkultura (socia) Plivivigo, atestas sian originon strikte ligita al la Oratorio San Luigi fondita de Don Bosco mem en la kvartalo de San Salvario.

En 1992 Sergio Durando, kiu faris sian civitan servon ĉe la Salesianoj, estis taskita okupiĝi de la porjunulaj aktivecoj.

Kriza periodo por la kvartalo: manko de spacoj por jululoj, kreskantaj fenomenoj de krimo kaj drogdependeco, videbla plimultiĝo de la enmigrintoj.

Sergio fondis la asocion ASAI en 1995, ene de la salesiana oratorio, kiel respondon al tiu situacio kaj al al novaj bezonoj de la kvartalo.

⁵ <https://www.youtube.com/watch?v=eylZJwovPRw>

Komence la agadoj estis celitaj ĉefe al la "knaboj de la strato" italaj, kun kiuj oni organizis grupojn, ekskursojn. Poste kelkaj gepatroj eksekvis la sportan agadon.

En 1997 ASAI pli rekte malfermiĝis al la enmigrintoj, starigante sian unuan kurson de la itala lingvo.

En 1998 Sergio kaj aliaj malfermis la unuan noktan ŝirmcentron.

Malpliboniĝo kaj konflikto kun la Salesianoj.

En 2000 ASAI lasas la Oratorion kaj translokiĝas al nova sidejo.

Komenciĝas nova epoko por la asocio.

Bela filmo pri ASAI: <https://youtu.be/ub0dq4240d0>.

8. Prelego de Manuela Burghilea, Rumanio/Britio: *Romaoj de Rumanio, enlande kaj eksterlande: renkontoj kaj marĝena plurlingvismo*

Romaoj de Rumanio, enlande kaj eksterlande: renkontoj kaj marĝena plurlingvismo

Bildoj de la prelego de la 1-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](https://www.youtube.com/watch?v=eylZJwovPRw)⁶):


Manuela Burghilea, Rumanio/Britio



ROMAOJ DE RUMANIO ,
ENLANDE KAJ EKSTERLANDE :
RENKONTOJ
KAJ MARGĜENA PLURLINGVISMO

Manuela Burghilea
UK 2023, Torino
1.08.2023

⁶ <https://www.youtube.com/watch?v=eylZJwovPRw>



Multnombra minoritato en Rumanio

16,79 milionoj da rumanoj (88,9%), 1,22 milionoj da hungaroj (6,5%) kaj 621.600 romaoj (3,3%) (laŭ popolnombro de 2011)

Tamen laŭ sociologiaj studoj:

1,5-2 milionoj da romaoj; multaj kaŝas sian etnan apartenon

Tutmonde

Ĉirkaŭ 20 milionoj da romaoj nuntempe, kun grandaj komunumoj en pli ol 30 landoj

Migradondoj al okcidenta Eŭropo ekde la jaroj 1990

Lingvo

Romani, kun pluraj dialektoj; similas al lingvoj de norda Barato

ĉ. 5-6 milionoj da parolantoj tutmonde, el kiu 273,500 en Rumanio

Endanĝerigita aŭ en stabila stato, depende de la landoj (Ethnologue)

Malforta ĉeesto en Interreto, malmultaj lernebloj

Romani Project ĉe la universitato de Manĉestro; Romaninet

Stereotipoj pri romaoj en Rumanio

- Ŝtelistoj
- Krimuloj
- Perfortuloj
- Almozpetantoj
- Parvenuoj
- Supozo de kulpeco
- 2 el 3 rumanoj kredas ke romaoj kulpas pri la plejparto de krimoj; 1 el 3 rumanoj kredas ke romaoj estas minaco por rumanoj kaj konsistigos estonte danĝeron por la lando



Esprimoj

- „Dacă nu ești cuminte, te dau la țigani” („se vi ne estas saĝa infano, mi donas vin al ciganoj”)
- „S-a înecat ca țiganul la mal” („dronis kiel cigano ĉe borde”)
- „a se țigăni” („cigani” – kverele marĉandi, fari skandalon)

Vortoj de romaa origino en la rumana

- „nașpa”, „nasol” (malbone)
- „gagiu” (amanto)
- „barosan” (riĉulo)
- „haleală” (manĝaĵo)
- „mișto” (mojose)



Historiaj faktoj

- Alvenis de nordokcidenta Barato en la teritorio de nuntempa Rumanio probable ekde la 11-a jarcento; unua dokumenta atesto en 1385
- Kutime nomataj ciganoj („țigani”), sed laŭ leĝprojekto de 2011 nomataj en oficialaj dokumentoj romaoj („rromi”) ; en aliaj eŭropaj lingvoj: „gitano”, „gypsy”, „karavalah”, „manush”
- Tradicie: forĝistoj, ĉevalvendistoj, muzikistoj; klarvidulinoj, sorĉistinoj
- En sklaveco dum 500 jaroj; konsiderataj marĉandaĵo
- Abolo de la romaa sklaveco en 1856
- Deporto al Ĉednestrio en 1942
- Ekstermo en gaskameroj la 2-an de aŭgusto 1944 en Aŭŝvico (Memor-Tago pri Holokaŭsto de Romaoj, aŭ “la forgesita Holokaŭsto”)



Reala socia problemo: Aranĝitaj geedziĝoj de infanoj, tradicie.

Personaj pensoj kaj spertoj

- Loĝis apud romaa kvartalo en Rumanio, sed ne rajtis eniri ĝin; „nevidebla muro”
- Estis sendita al pli fora lernejo por ne esti en la sama lernejo kun la romaoj
- „Lernis” ne ŝati muzikon „manele”
- Neniam lernis en la lernejo pri la historiaj misfaroj kontraŭ romaoj
- Eniris la romaan kvartalon poste, freŝdate, per Google Maps:
<https://www.google.com/maps/place/Strada+George+Enescu+254,+Vaslui,+Romania/@46.6360311,27.7206295,17z/data=!3m1!4b1!4m6!3m5!1s0x40ca737e52141211:0xe4ff13d66eb0b451!8m2!3d46.6360311!4d27.7232044!16s%2Fg%2F11cpm0qy7q?entry=ttu>
- Kontaktiĝis kun romaaĵ komunumoj dum volontulado en Lilo, Francio, ĉe asocio EPIS (Éducation Populaire, Insertion, Sensibilisation); volontulis pri alfabetigo de infanoj, tradukado, perado inter la francaĵ volontuloj kaj la romaoj venintaj de Rumanio
- Konatiĝis kun asocio Rencon'roms nous dum volontulado ĉe Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo, Francio

9. Prelego de Jérémie Sabiyumva, Burundo: *Sperto kiel migranto en D.R. Kongo kaj en Tanzanio*

Sperto kiel migranto en D.R. Kongo kaj en Tanzanio

Resumo de la prelego de la 3-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](#)⁷):

Jérémie Sabiyumva, Burundo

Miaj spertoj pri migrado



- de Burundo al Kongo
- de Kongo al Tanzanio
- de Tanzanio al Burundo

- * Burundo suferis enlandan militon tuj post la sendependiĝo: 1969, 1972, 1984, 1993.
- * Mi ne revenos al la kaŭzo de tiu milito inter Hutu kaj Tutsi.
- * Sed tio ege tuŝis vivon de multaj burundanoj en ambaŭ “etnoj”.
- * En 1972 miaj gepatroj ekkonatiĝis en rifuĝejo en Kongo.
- * Geedziĝis kaj naskis 4 gefilojn kaj mi estis la 4-a.

⁷ <https://www.youtube.com/watch?v=Chwl-POGfc4>

- * Kiam mi estis trimonata, la familio rehejmeniĝis, sed pro la fakto, ke miaj gepatroj (kaj la patro kaj la patrino estis miksaĵoj de la du “etnoj”), ni estis forĵetitaj de niaj familioj.
- * Ni kreskis sen havi privilegion esti amataj de niaj geonkloj.
- * La gepatroj devis serĉi rifuĝ-lokon, iom for de siaj familioj, ĉar la unua danĝero por ili estis siaj propraj gefamilioj.
- * En Burundo naskiĝis aliaj gefratoj kaj entute ni estas belaj gefratoj.
- * En 1993 post mortigo de la unua elektita Prezidento fare de tutsi-grupo, denove okazis kruela milito.
- * Ni, kiuj estas el miksaĵo, ni ne sciis, kiun lokon iri, ĉar neniu “etno” povus akcepti nin, do iu ajn povus mortigi nin.
- * Ni fuĝis denove al Kongo.
- * Mi estis 10-jaraĝa kaj povus memori, kio okazadis.
- * Tiam en Afriko, kaj ĉefe en Kongo, ne estas facile vivi kiel rifuĝanto, havaĵoj estis forprenitaj, moko/insultoj flanke de lokanoj, malbonaj vivkondiĉoj, ĉar ne estis helpo de organizo.
- * En 1994 okazis genocido en Ruando.
- * La Ruanda armeo eniris Kongon por serĉi genocidantojn.
- * La Ruanda armeo estis tre danĝera kaj mortigis milojn da homoj en Kongo, sen selekti; ĉiu, kiu havis malbonan ŝancon esti en kontakto kun ĉi armeo, mortis.
- * Ni kune kun kongolandanoj fuĝis al Tanzanio.
- * En Tanzanio dum la unuaj tagoj estis malfacile.
- * Tamen poste venis UNHCR kaj la vivo revenis.
- * Estis konstruita lernejoj en rifuĝejoj.
- * Ĉar ĉiam estis problemo pro nia nekonata “etno”, ĉiam ni sentis nin en danĝero.
- * En Burundo estis plena milito inter la armeo (Tutsi) kontraŭ ribelantoj (Hutu).
- * Miaj gepatroj decidis reveni al Burundo.
- * Miaj aĝaj gefratoj restis en Tanzanio: la ideo estis, ke kaze de tio, ke io malbona okazus, restu almenaŭ kelkaj.
- * Mi rehejmeniris kun miaj gepatroj.
- * Miaj plej aĝa fratino, kiu restis en Tanzanio, havis protekton en Aŭstralio.
- * 4 gefratoj migris al Malavio.
- * 2 fratoj revenis al Burundo.
- * Pro tiuj streĉoj miaj gepatroj frue forpasis.

Kion mi lernis?

- * Pli bone trakti rifuĝantojn/migrintojn, ĉar la situacio povus ŝanĝiĝi por vi.
- * Tiuj, kiuj mistraktis nin en Kongo, fuĝis kun ni al Tanzanio, kaj ni estis en samaj kondiĉoj.
- * Ni helpu al iu ajn, kiu migras, ĉar tiu persono havas kialon fari tiun movon.
- * Neniu certe ŝatas forlasi sian landon, nur kondiĉoj puŝas lin fari tion.

10. Prelego de Amri Wandel, Israelo: *Israelo kaj la juda enmigrado: de la komenco de cionismo ĝis nun*

Israelo kaj la juda enmigrado: de la komenco de cionismo ĝis nun

Prelego de la 3-a de aŭgusto 2023, prezentita ankaŭ dum la VK en novembro 2023 (re-spektebla en [UEAviva](#)⁸):

Amri Wandel, Israelo



Juda Enmigrado al Palestino pliiĝas en la 19-a jarcento

- Fruaj kolonioj (1800-1882).
- La unua ondo de juda enmigrado al Palestino komenciĝis en la frua 19-a jarcento.
- Ĝi konsistis el grupetoj de religiemaj judoj, kiuj serĉis vivi en la Sankta Lando.

⁸ <https://www.youtube.com/watch?v=Chwl-POGfc4>

➤ Tiuj “veteranaj enmigrintoj”, konataj kiel “La Malnova Setlado” (היישוב הישן), establis plurajn komunumojn ĉefe en Jerusalemo, Ĉfat, Tiberiado, kaj Hebrono.

La cionisma movado vigligas la judan enmigradon al Palestino

- Solvo de la juda problemo per migrado al Palestino, poste Israelo.
- Herzl kaj la cionismaj kongresoj ekde 1897 (Bazel), la diplomatia cionismo.
- Lia libro “Ŝtato de la judoj”.
- Zamenhof komence apartenis al la popola movado “Ĥibat Cijon”.

Ondo de Juda Enmigrado al Palestino dum la Unua Alija (1882-1903)

- La komenco de grandskala juda enmigrado.
- Pro la pliiĝo de antisemita persekuto en Orienta Eŭropo.
- La enmigrintoj, plejparte de Rusio, formis agrikulturajn setlejojn konatajn kiel moshavot.
- Inter ili rimarkindaj estis Rishon LeCion kaj Zichron Yaakov.

Dua Alija (1904-1914) - Ideologia enmigrado

- Ĉefe socialismaj kaj ideologie motivitaj judaj enmigrintoj.
- Multaj el ili fondis kibucojn (kolektivaj agrikulturaj komunumoj).
- La evoluo de la hebrea kiel parola lingvo.
- Tel-Avivo, fondita en 1909, aperis kiel grava urba centro.

Migradoj en 1918-1998: judaj migroj al Palestino/Israelo

- Ĝis 2a mondmilito de Sovetio kaj Eŭropo al Palestino.
- Post la Holokaŭsto de Eŭropo al Palestino.

- 1948-1960 de arabaj landoj al Israelo.
- Ekde 1980 de Etiopio al Israelo.
- Ekde 1990 de antaŭa Sovetio al Israelo.

La Brita Mandato (1917-1947)

- La Ligo de Nacioj donis al Britio mandaton super Palestino.
- Juda enmigrado pliiĝis sub brita rego, movita per la Balfour Declaration (1917), kiu esprimis britan subtenon por "nacia hejmo por la juda popolo" en Palestino.
- Arab-judaj streĉoj eskaladis (1936-39).
- La limigo de enmigrado far' la brita regno.
- La Haapala (Alija Bet) - neleĝa enmigrado kaj konfliktoj kun la brita regno.

Ha'apla – kontraŭleĝa enmigrado de eŭropaj judoj



Tria kaj kvara Alija (1919-1929): Daŭra Juda Enmigrado en la Intermilita Periodo

- La tria Alija - judoj fuĝintaj de persekuto kaj ekonomia malstabileco en Orienta Eŭropo post 1-a Mondmilito.

- La kvara Alija - pro antisemita politiko kaj ekonomiaj afliktoj.
- Multaj intelektuloj kaj profesiuloj havis signifajn kontribuojn al la avancado de diversaj sektoroj de la juda komunumo en Palestino, inkluzive de edukado kaj kuracado.

Kvina Alija (1929-1939): Sub la ombro de nazia persekutado

- Pro la Nazia Germanio kaj la pli malbonaj kondiĉoj por judoj en Eŭropo.
- Fermiĝo de la eblecoj migri al Usono.
- Inter la enmigrintoj estas multaj intelektuloj kaj profesiuloj.
- Konstruado de novaj komunumoj kaj institucioj.
- La britoj pli kaj pli limigas la permesitan kvoton.

Holokaŭsto kaj rifuĝintoj (1939-1948)

- La holokaŭsto dum la 2-a mondmilito rezultigis la ekstermon de ses milionoj da judoj.
- Multaj holokaŭstaj travivintoj serĉis rifuĝon en Palestino.
- Rifuĝinto-tendaroj en Eŭropo.
- Enmigrado spite de britaj limigoj.
- Britaj kampadejoj por forpelitoj.

Judoj en Eŭropo, ĉirkaŭ la jaro 1933:



Judoj en Eŭropo, en la jaro 1950:



La divido-propono de UN kaj Israela ŝtato 1947-1949:

- Kulmino de la juda enmigrado.
- La brita retiriĝo ebligis liberan enmigradon el la kampadejoj de la travivantoj de holokaŭsto.
- La Araba-Israela-Milito, juda enmigrado de multaj judaj komunumoj el la arabaj ŝtatoj en la Mezoriento kaj Norda Afriko.

Enmigrado post la ŝtatiĝo (1950-2000): “Kibuc Galujot”, juda mikspoto en Israelo

- Post la establo de Israelo, juda enmigrado amasiĝas.
- 1950aj kaj 1960aj de la arabaj landoj en Nordafriko (Maroko, Tunizio, Alĝerio kaj Libio) kaj la Mezoriento (Irako, Sirio, Egiptio).
- Sovetiaj judoj en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj.
- Etiopaj judoj migras al Israelo en Operacioj “Moseo” kaj “Salomono”.
- De antaŭa Sovetunio ĉ. unu miliono da enmigrintoj dum la 1990-aj.
- Defioj de integriĝo lingvaj kaj kulturaj.

11. Prelego de Costantine Mashauri, Tanzanio: *Regionaj komunumoj en Afriko*

Regionaj komunumoj en Afriko

Prelego de la 3-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](#)⁹):

Costantine Mashauri, Tanzanio

Speciala rigardo al la plej rapide kreskanta komunumo, la Orient-Afrika Komunumo (OAK): Kion la membro-ŝtatoj de la komunumo faras pri integriĝo kaj libera movado de personoj?

LA ORIENTA AFRIKA KOMUNUMO (EAC)

Mapo de la membr -
ŝtatoj



⁹ <https://www.youtube.com/watch?v=Y1pKbi3bA4w>

Membroŝtatoj:

- Demokratia Respubliko Kongo
- Burundo
- Kenjo
- Ruando
- Suda Sudano
- Ugando
- Tanzanio

Loĝantaro entute: ĉirkaŭ 300 milionoj

Areo entute: proksimume 4,8 milionoj da kvadrataj kilometroj

ĝi tuŝas la du marojn en la Mondo



Vizio:

Krei prosperan, konkurencivan, sekuran, stabilan kaj politike unuiĝintan regionon en Orienta Afriko.

Misio:

Larĝigi kaj profundigi ekonomian, politikan, socian kaj kulturan integriĝon por plibonigi la kvaliton de vivo de la popolo de Orienta Afriko.

Valoroj de la organizaĵo:

- Profesiismo
- Respondigo
- Travedebleco
- Kunlaboro
- Unueco en diverseco kaj
- Fideleco al OAK-idealoj

Kial estas grave unuiĝi?

Interdependeco inter la 7 membro-ŝtatoj:

- La homoj havas komunan historion, lingvon, kulturon kaj infrastrukturajn rimedojn.
- La regiono havas abundajn diversajn naturajn rimedojn.
- Ĝi havas la finfinan celon por politika federacio.

Historio de la Orient-Afrika integriĝo:

- **1900** Mombaso establita kiel Dogano kolekta centro por Ugando.
- **1905** Monera Estraro stariĝis kun celo eldoni valuton por Kenjo kaj Ugando.
- **1917** Dogano Unio inter Kenjo kaj Ugando - Tanganjiko aliĝis en 1927.
- **1948** Alta Komisiono (kvazaŭ ambasadejo) estis establita.
- **1961** Komuna Servo: Organizo estis fondita (Poŝto kaj Telekomunikadoj, Fervojoj & Havenoj, Aviadila kompanio, Aviadaj servoj kaj la Orient-Afrika Banko de Evoluigo).
- **1967** La traktato stariganta la unua Komunumo estis subskribita.
- **1977** La tiama Komunumo kolapsis/disiĝis.
- **1984** Mediacio/Interkonsento estis subskribita por divido de propraĵoj.

Kial la komunumo kolapsis/malfunkciis/disiĝis:

1. Malsamaj politikaj ideologioj persekutis la individuajn membroŝtatojn: Kenjo estis kapitalisma, Tanzanio socialisma, dum Ugando estis miksita.
2. Influo de orienta kaj okcidenta blokoj dum la periodo de Malvarma Milito.
3. Malkonkonsentoj por la interŝanĝo de profitoj akiritaj de komun-servaj organizoj kaj manko de gvidlinioj por restarigi la situacion.

4. Malgranda privata sektoro kaj civila socio, involviĝo en la kurado de la tiama Komunumo.
5. Fremda influo en la ekonomia stato de la membroŝtatoj.
6. Manko de unuformeco en administrado, manko en demokratiigaj procezoj (diktatorecoj, militaj batoj, civila malpaco kaj misuzo de homaj rajtoj).

Influo/damaĝo de la kolapso/malfunkcio:

- Perdo de laborpostenoj.
- Perdo de komunaj servoj.
- Perdo de libera movado de personoj, varoj kaj servoj en la regiono.
- Negativa naciismo estis kreita.
- Malbona kaj malŝparema konkurado floris unter la landoj.
- Politika malstabiliĝo kreis pli da streĉo inter la landoj kaj malamikecon.
- Suspekto kaj malkonfido inter membroŝtatoj.

Revivigo de la nuna orienta afrika komunumo

1. Mediacio: Interkonsento por la divido de propraĵoj de la unua komunumo estis subskribita en 1984 kaj havis provizon esplori manierojn por rekomenci la regionan kunlaboron.
2. Ĉe flanka kunveno de la ŝtatkomunumo *Commonwealth* okazinta en Harareo, Zimbabvo, en la jaro 1991, ŝtatestroj de Kenjo, Tanzanio kaj Ugando konsentis revivigi kunlaboron en la regiono.
3. La kunlaboro kondukis en 1993 al la subskribo de interkonsento por la revivigo de la Konstanta Triparta Komisiono por Orient-Afrika kunlaboro.
4. Marto 1996: La sekretario de la Orient-Afrika kunlaboro estis lanĉita en Aruŝo.
5. 30-a de novembro 1999: La Traktato stariganta la Orient-African Komunumon estis subskribita en Aruŝo, Tanzanio
6. 7-a de Julio 2000: Ekvalido de la traktato



La ŝtatestroj subskribantaj la traktaton en novembro 1999.



Fundamentaj principoj de la nuna komunumo:

- a) Reciproka konfido, politika voll kaj suverena egaleco
- b) Paca kunekzisto kaj bona najbareco
- c) Paca solvo de disputoj
- d) Bona regado inkluzive de aliĝo al la principoj de demokratio, juro, respondeco, travideble o, socia justeco, egaleco de ŝancoj, agnosko, promocio kaj protekto de la rajtoj konforme alla Afrika Ĉarto pri homaj kaj popolaj rajtoj
- e) Justa distribuado de profitoj
- f) Kunlaboro por reciproka profito

La kolonoj por la komunumo - integriĝo:

- Dogano-Unio (establita en 2005)
- Komuna Merkato (lanĉita la 1an de Julio 2010)
- Mona Unio (planita por la jaro 2024)
- Politika Federacio (finfina celo, bazita sur jenaj kolonoj: komunaj eksteraj kaj sekurecaj politikoj, bona regado kaj efektivigo de la antaŭaj etapoj de regiona integriĝo)

Protokolo por la libereco kaj rajtoj ene de la Komuna Merkato:

La protokolo provizas la jenajn rajtojn:

- Libera movado de varoj
- Libera movado de personoj
- Libera movado de laboro
- Rajto je establiĝo
- Rajto de loĝado
- Libera movado de servoj
- Libera movado de kapitalo



“Unuhalta limstacio” je la limo de Kenjo kaj Tanzanio.

Celo de la unuhalta limstacio:

- Plifaciligi komercajn interrilatojn
- Antaŭenigi efikan movadon de personoj kaj varoj
- Redukti la kostojn de komerco en la regiono

Kelkaj rezultoj de la libereco ene de la komuna merkato:

- Oni laboras ne nur en la lando de la propra origino
- Institucioj havas branĉojn ĉie en la 7 membroŝtatoj (bankoj, asekuroj)
- Oni rajtas loĝien iu ajn lando ĝis ses monatoj sen laborpermeso
- Valida dokumento pri asekuro sufiĉas por movigi aŭton en la 7 membroŝtatoj
- Studado senlima
- Geedziĝoj

Organoj kaj institucioj de la komunumo:

- Sekretariejo (EACS)
- Parlamento (EALA)
- Tribunalo de justeco (EACJ)

Defioj

La integriĝa procezo, malgraŭ la atingoj, alfrontas defiojn:

- Tedaj kaj multekostaj decidoj / politikaj procezoj
- Efektivigi projektojn dependas de la membroŝtatoj
- Nacia suvereneco kaj manko de plenuma aŭtoritato ĉe OAK-nivelo
- Ekonomia malegaleco ĉe membroŝtata nivelo kaj manko de egaleca mekanismo
- La ŝanĝantaj influoj el aliaj landoj tutmonde

Konkludo

Ĉu OAK funkcias laŭ la kongresa temo “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”?

El ekonomiaj vidpunktoj? - Jes! Movo de kapitalo ktp.

El socialaj vidpunktoj? - Jes!

- Homoj rajtas vivi en alia lando kaj rifuĝintoj estas bonvenaj en alia lando
- Studentoj rajtas iri al lernejoj de la unua grado ĝis al universitato pagante saman sumon kiel lokano
- Unu vizo - survoje
- Telefon-alvokoj inter la sep membroŝtatoj same kostaj kiel enlandaj

El politika vidpunkto? - Jes! Landoj bonvenigas rifuĝintojn el najbaraj landoj kaj el ekster la komunumo.

Konklude, en OAK migrado jam estas adresita kaj plifaciligita. Rifuĝintoj ne estas forpelitaj, ekzemple el Somalio, Kongo, Burundo ktp.

Kion oni diru pri la komunumo?

- La pozitivaj evoluoj okazantaj en la regiono indikas, ke OAK iras al ĝusta vojo.
- La integriĝo-procezo povas esti prokrastita aŭ malrapidigita, sed ne povas esti haltigita aŭ inversigita.

12. Prelego de Marjolaine Bert, Francio: *EKO! — agado por kaj kun rifuĝintoj en Lesbos (Grekio), Marseille kaj Briançon (Francio)*

EKO! — agado por kaj kun rifuĝintoj en Lesbos (Grekio), Marseille kaj Briançon (Francio)

Bildoj de la prelego de la 3-a de aŭgusto 2023 (re-spektebla en [UEAviva](https://www.youtube.com/watch?v=Y1pKbi3bA4w)¹⁰):

Marjolaine Bert, Francio



¹⁰ <https://www.youtube.com/watch?v=Y1pKbi3bA4w>



- asocio inda je ĝenerala intereso
- pozitivaj kaj novigaj projektoj
- solidareca kaj daŭripova evoluo



4 valoroj:



kohero



sobreco



sendependigo



malfermo



Simplaj
teĥnikoj

kaj

Rifuĝintoj

- rezistemo kaj aŭtonomeco de la ekziliĝintoj
- diskonigo de scipovoj kaj de sistemoj kun sobraj teĥnikoj
- soci-profesia integriĝo per ekologiaj metioj
- kontribui al la daŭripova disvolvigo de teritorioj

Surloka agado
en kompleksaj kunteksto
malgraŭ interdependaj defioj



BRIANÇON

Transpaŝo de la franc-italaj Alpoj
De 03/2020



MARSEILLE

Mediterranea metropolo
De 03/2020



LESVOS

Greka insulo ĉe la turka limo
La plej granda rifuĝejo en la Eŭropa Unio (Moria)
01/2018-12/2021




100 milionoj da homoj ekziliĝintaj en la mondo!



Fokuso pri Briançon

- Politika kunteksto malfavora al deca akceptado.
- Komuna laborejo "Solidaraj Terasoj"
Konstruaĵo aĉetita per 1 M€ da solidara investado
4 kunlaboraj organizaĵoj de 2020:



Kio estas sobraj aŭ simplaj aŭ
malaltaj teĥnikoj?



UTILAJ



ALIREBLAJ



DAŬRIPOVAJ



5

Ekzemploj de sobraj teĥnikaj novigoj



Krom -baterio



Lakta fermentado



Suna bakforno



Ekologia legom -kultivado



Akvo -ŝpara fiorepoto



Filtrilo por akvo



Pluraparata pedalilo



Sun-lampo



Sendependa lavabo



Sun -radia koncentrililo



Abel -bredado



Suna sekigilo



Fungo -kultivado



Kultivado en nutra akvo



Urba kompoŝtado
"Bokaŝi"



Varm -izola kurteno



Spicherboj kaj
sanigaj plantoj



Memfarataj sapoj



Celoj



→ Plenumi necesajn bezonojn (loĝado, moviĝo, energio, telefono ktp.)

→ Plenumi mensajn bezonojn (agado, digno, memfido)

→ Ebligi renkontiĝojn kaj krei sociajn ligojn por faciligi integriĝon en la socio

→ Valorigi ekzistantajn scipovojn kaj tradiciajn heredaĵojn

→ Iniciati lernadojn per memfarado

→ Malkaŝi estontajn ekologiajn profesiojn, kaj akompani integriĝon.

SCIPOVO

SOLIDARECO

EKOLOGIO





Agadoj

- Grupa praktikado kaj komuna lernado de simplaj teĥnikoj
- Profesiigaj seminarioj
- Gvidado por soci-profesia integriĝo
- Riparejoj per simplaj teĥnikoj : miksitaj grupoj
- Subteno al lokaj organizaĵoj en solidareca kaj ekologia kampoj
- Diskonigo de malalt-teĥnikaj sistemoj
- Kaj la virinoj



Komunaj praktikadoj Kapabligoj- Akompanadoj- Riparejoj

Efiko



+ 10 000 produktantaj profitantoj
+ 9 000 faritaj kaj riparitaj simplaj teĥnikaj objektoj
86 % el la materialoj devenas de reutiligo
98 % el la skipo estas volontuloj
PREMIOJ
★ 'Klimato -Energio' 1% Por la Planedo 2018 kaj 2021
★ 'Sociala solidareco' Fonduso Cognacq -Jay 2019 (fonduso por solidareco, sano, edukado, ks)
★ 'Cirkla ekonomio' Alvoko al Solvoj de Ashoka 2020 (akcelilo por sociaj novigoj fronte al defioj)
★ 'Virino entreprenistino' La Mirindaĵoj 2021 (fonduso por seksa egaleco)
★ 'Socia Virino por ĉi-jaro' Altaj Alpoj por Inoj 2021
★ 'Francujo' Defio por Navigado de Verdaj Kapabloj 2021
1-a komunumo pri malalt-teĥnikoj de Francujo
Eŭropa Unio, UNO (Unuiĝintaj Nacioj), REH (Reto pri Homhelpo kaj Mediprotektado) ...



Associatio

Sin ripari kaj sin konstrui...



La ago -povo de Momo !

SEKVU NIN!



Retejo: www.asso_eko.org

S-ino Marjolaine BERT

"Marjolen"

Fondintino kaj Direktorino

marjolaine.bert@asso_eko.org

(+33) 783 915 952



**13. Prelego de Tea Turmanidze-Fabre, Kartvelio/Francio:
*Migradspertoj de kartvela esperantistino***

Migradspertoj de kartvela esperantistino

Resumo de la prelego de la 4-a de aŭgusto 2023:

Tea Turmanidze-Fabre, Kartvelio/Francio

KONCIZA SINPREZENTO:

- Mi nomiĝas Tea TURMANIDZE kaj mi estas kartvela.
- Mi loĝas ekde 8 jaroj en Francio kun mia edzo, kiu ankaŭ estas esperantisto
- Iamaniere mi estas elmigrantino pro Esperanto

KARTVELIO: SUR ĈEFA VOJO DE UNUAJ MIGRADOJ

Delongtempe homoj ĉeestis en Kartvelio:

- Kaŭkazio estis ĉiam natura vojo inter Afriko, Azio, kaj Eŭropo
- La plej malnovaj eltrovitaj homoj datiĝas je -1,85 miliono da jaroj

MALNOVA ELMIGRADO

Gravaj faktoj pri malnovaj kartvelaj elmigradoj:

- La kartveloj ne multe elmigris laŭvole,
- nur pro la tro multaj militoj kontraŭ la invadistoj kaj apudaj imperioj,

- dum la komunista sistemo (1921-1991) por studi, militservi, aŭ labori... ene de la limoj de Sovetunio.

KIALOJ DE LA NUNTEMPA ELMIGRADO

Ekde la disfalo de Sovetunio (1991) la ĉefaj kialoj por elmigri estis:

- Unue nenio plu funkciis (institucioj, ekonomio, energio), eĉ aperis malsato en tiu riĉa rilate al la naturmedio lando.
- La krimo fariĝis ĉiutaga timo.
- Multe da grekoj, armenoj, rusoj, judoj, azeroj komencis forfuĝi al iliaj devenlandoj. La multkultura kunvivado, ĉeestanta ekde antikveco, malriciĝis.
- Komenciĝis enlandaj militoj plurfoje subtenataj de Rusio, ĉefe en Abĥazio kaj suda Osetio. El tiuj du regionoj, 363 000 homoj forfuĝis.kaosa kaj malhela estonteco, kiu puŝadis la kartvelojn elmigri.

LASTATEMPA ELMIGRADO

Post la disfalo de Sovetunio, elmigrado de kartveloj multe plialtiĝis:

- Ĉiujare averaĝe 100 000 homoj foriras el la lando,
- Ĉefe pro la ekonomia situacio, tamen ankaŭ pro politikaj kialoj,
- Ili ĉefe migris al Rusio, Grekio, Turkio, Italio, kaj Germanio (entute 66%).
- La nombro da kartveloj, kiuj vivas eksterlande atingas proksimume 1,5 milionon.

Tiu granda cifero starigas gravajn problemojn enlande, ĉefe por trovi laboristojn... eĉ se lastatempe la alveno da enmigrantoj aperis kaj rapide kreskis.

LA SPERTOJ DE MIA FAMILIO

Pri mi:

- Mi apartenis al la “perdita generacio”. Tamen, mi ĉiam interesiĝis, kiamaniere vivas la homojn alilande. Pro tio mi eklernis Esperanton.

- Mi renkontis unuafoje fizike mian estontan edzon en Germanio, kie mi laboris kiel vartistino. Pro malbona konsilio pri mia restadrajto, mi estis arestita far germanaj policianoj en flughaveno kaj juĝita: mi devis reveni hejmen kaj ne rajtis ĉeesti dum kvin jaroj en la ŝengenspaco.

- Bonŝance mia edzo trovis laboron en Kartvelio, kie ni geedziĝis. Ekde 2015 ni revenis Francien kaj mi komencis labori en internacia etoso, ĉefe kiel kuiristino.

Pri mia fratino:

- Mia fratino kvinfoje trapasis kaŝite danĝeran limon por atingi Israelon el Egiptio. Kvarfoje la policianoj kaptis ŝin kaj resendis ŝin kartvelien. Lastfoje ŝi sukcesis, tamen aliaj trapasantoj estis trafataj per kugloj.

KONKLUDO

Por ne perdi nian humanecon neniam forgesu, ke malantaŭ ĉiu enmigranto kaŝiĝas malfacilaĵoj kaj eĉ suferoj.

Prezento de filmoj de Roman Dobrzyński pri Bona Espero en Brazilo

Okazis dum la UK en Torino: lundon, mardon, ĵaŭdon, vendredon, po 1 horo:

“Bona Espero” estas Esperanta edukejo, bienlernejo, por soci-helpbezonaj infanoj en maldense loĝata parto de Brazilo. Esperantistoj instruas infanojn, kiuj ne havas familion aŭ kiuj spertis mizeraĵajn vivkondiĉojn. Antaŭ preskaŭ 50 jaroj la geedza paro Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia el Torino translokiĝis al Bona Espero por labori tie, por evoluigi la bienon, por eduki infanojn. Giuseppe Grattapaglia bedaŭrinde forpasis en junio 2023, en la aĝo de 92 jaroj.

Roman Dobrzyński, ĵurnalisto de ŝtata pola televido, vizitis Bonan Esperon 11 fojojn ene de la pasintaj kvar jardekoj. Roman Dobrzyński realigis plurajn filmojn pri Bona Espero. Tiujn entute 9 filmojn oni prezentis en la UK, kun la ĉeesto de sinjorino Ursula Grattapaglia el Bona Espero; same ĉeestis la aŭtoro de la filmoj. Ambaŭ estas honoraj membroj de UEA. La listo de filmoj estas prezentita sube:



Prezentitaj filmoj	Jaro	Daŭro	Havebla en la Libroservo de UEA?
La Angulo de Bona Espero	1984	18'	Jes!
La centjara Esperanto: filmo prezentanta praktikan uzon de Esperanto en 12 landoj kun epizodo pri Bona Espero	1987	47'	Jes!
Kvin jarojn poste	1989	13'	Ne
Ludovikoj en Brazilo: vizito de Ludoviko Zaleski-Zamenhof	2000	23'	Ne
Unu tago en paradizo	2003	22'	Ne
Ora Bona Espero: 50-jara jubileo de Bona Espero	2007/2012	25'	Jes!
Stelo de Bona Espero 17' (2008) (Kristnaska teatraĵo farita de infanoj)	2008	17'	Ne
Bona Espero, nia tero: fina reformo de Bona Espero	2014	23'	Jes!
Nokturno de Bona Espero: bildoj pri Bona Esernato kun muziko de F. Chopin	2016	8'	Jes!

Pri "La centjara Esperanto": ĝi estas filmo (47 min.) de Roman Dobrzyński farita en 12 landoj okaze de la centjara jubileo de Esperanto (1887-1987), kiu montras diversajn formojn de ĝia aplikado (ĝi estis eldonita en Varsovio, Pollando, 1987). Ĝi estas dokumento pri la praktika funkciado de la lingvo en tri kontinentoj, kun bazaj informoj pri la movado, unuafoje prezentita dum la 72-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), kiu okazis en Varsovio, Pollando, en 1987. Ĝi estis produktita de la Pola Televido en du lingvoj. La Esperantan version aĉetis UEA, kiel celuloidan bendon. Ĝi estis finita antaŭ la 72-a UK kaj dum ĝi ĉiutage prezentata. Ĝi principe vendiĝis memstare kiel VHS-PAL. Poste aperis en DVD kune kun la filmo "Varsovio cent jarojn poste" (havebla en la Libroservo de UEA:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9071>

Ankaŭ la jutubkanalo de UEA, UEA viva, disponigas ambaŭ filmojn, senpage:

https://www.youtube.com/watch?v=g-TZsu_GM00

(Ĉiuj estas invitataj pro tio kontribui per simbola donaco laŭ la valoro de 12.30 €, prezo de la DVD, al la ĝenerala kaso de UEA: <https://uea.org/alighoj/donacoj/kaso> – kio helpas la Asocion daŭrigi tian agadon disponigi historiajn filmojn.)

Cetere ambaŭ tiuj filmoj, "Varsovio cent jarojn poste" (1987) kaj "La centjara Esperanto" (1987), de Roman Dobrzyński, kaj aldone la Nacia Vespero de la 88-a Universala Kongreso (UK) de Gotenburgo (2003) konsistigis la inaŭguran kinejon de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), en la 16-a de julio 2021. La celo estis ebligi al kongresanoj ekscii (aŭ rememori!) dum la pandemia epoko, kia estas la etoso de ĉeesta UK. Varsovio gastigis la plej grandan UK-on de la historio kaj Gotenburgo proponis modernan nacian vesperon. Aliaj programeroj de la 2-a VK ankaŭ omaĝis diverse la UK-ojn. Jen la menciita nacia vespero:

<https://www.youtube.com/watch?v=YCe-GXypAPw>

Aneksaĵoj:

Longa versio de la rezolucio de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio

La 1 318 partoprenantoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado — kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniaj lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis — en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj, kiuj nun vivas en alia ŝtato ol la ŝtato, en kiu ili naskiĝis. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj - ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto. Ni konstatas, ke en multaj regionoj de la mondo rifuĝantoj formas nov-estiĝantajn lingvajn minoritatojn, kiuj suferas diverskampajn diskriminaciojn inkluzive de tiu pro nesufiĉa scio de la koncerna nacia lingvo. Ni apelacias al ŝtataj instancoj garantii al ĉiuj migrantoj aliron por lerni la lokajn lingvojn. Neregistaraj organizoj, kiuj jam nun agas en tiu kampo, ricevu subtenon.

La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion. Ni diskutis kun reprezentantoj de neregistaraj organizoj en Torino, kiuj depost jardekoj organizas lingvajn kursojn por migrantoj, helpas al ili trovi loĝejojn kaj laborlokojn kaj subtenas ilin fine fariĝi anoj de la komunumo de Torino kun samaj rajtoj. La civila socio en Torino evoluigis strategiojn por precipe subteni la infanojn de familioj de rifuĝantoj, por ke ili vivu sen diskriminacio kun egalaj ŝancoj.

Ĉio tio ne nur estas helpo por migrantoj, sed tio samtempe pliriĉigas la kulturon de la tuta socio kaj liveras laborforton bezonatan en maljuniĝantaj socioj.

Ni agnoskas la historian valoron de interŝtataj migradoj ĉie ajn en la mondo, ĉar per tiuj migradoj kunfluis homaj valoroj — migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke laŭ statistiko de Unuiĝintaj Nacioj la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro 2022 unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. La cifero kreskas de jaro al jaro. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

Aparte alarmiga estas la fakto, ke regule mortas rifuĝantoj dum la provo eskapi mizeron. Ekzemple, en la Mediteranea Maro, kies bordo situas proksime de la kongresa urbo, pasintjare mortis pli ol 2 400 migrantoj dum la provo atingi la marbordon de la eŭropa kontinento.

Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj, ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem.

Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948. Multaj homaj rajtoj plenumiĝas lingve – ekzemple rajto je medicina prizorgo ne povas plenumiĝi, se ne eblas komuniki kun la kuracisto. Do indas paroli pri lingvaj homaj rajtoj kaj ni devas pledi por ke homoj, kiuj apartenas al lingvaj malplimultoj – negravas ĉu historiaj aŭ novaj kaj rezultaj je migrado – havu aliron al la universalaj homaj rajtoj.

Nun en la jaro de la 75-a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo, ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj, kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

UEA.facila: la rezolucio en facila lingvaĵo por lernantoj

Originale en la retejo UEA.facila.org: [Enmigrado: la kongresa temo](#)

Enmigrado: la kongresa temo en Torino

Versio kreita de Anna Löwenstein. [Eblas aŭskulti ĉi tiun artikolon](#), kiun voĉlegis Patrick Morando.

Ĉiu Universala Kongreso havas temon, kiun la partoprenantoj diskutas dum la kongresa semajno. Ĉi-jare en Torino, oni traktis la temon “Enmigrado – kun-fluo de homaj valoroj”. La organizanto de la Kongresa Temo estis Thomas Bormann, germana ĵurnalisto, kiu ofte raportas pri la situacio de rifuĝantoj en Turkujo kaj Grekujo.

Granda parto de la 1318 kongresanoj, kiuj venis el 69 diversaj landoj, partoprenis en la kunvenoj pri la Kongresa Temo. Ili ne nur informiĝis pri la problemoj de migrantoj, sed mem spertis la “kunflon de homaj valoroj”. Ĉar ili ĉiuj parolis kune en Esperanto, sen bezono de interpretistoj kaj tradukistoj, neniam lingvaj baroj malhelpis ilian rektan interkomunikadon en amika etoso.

Luj esperantistoj raportis pri siaj propraj spertoj kiel migrantoj. La fakto, ke ili jam parolis Esperanton, helpis ilin havi kontaktojn kaj subtenon en la nova lando. Sed kompreneble Esperanto en si mem ne sufiĉas. Migranto nepre devas lerni la nacian lingvon de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Fine de la semajno oni publikigis la kongresan rezolucion. En la rezolucio oni notis, ke la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj, kaj precipe rifuĝantoj, en la socion. Sed la kongresanoj konstatis kun zorgo, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo dum la pasinta jaro unuafoje superis 100 milionojn. Krome, pro la klimat-ŝanĝiĝo, pli kaj pli da homoj devos forlasi sian hejmon estonte.

Samtempe, la kongresanoj parolis pri la dezirindaj aspektoj de migrado. Efektive migrado estas la bazo por la evoluo de la homaro. Ĝi rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bon-statan socion en la landoj, kie migrantoj ekloĝas.

En la rezolucio, la kongresanoj alvokis al la ŝtatoj, kiuj ricevas rifuĝantojn. Tiuj ŝtatoj devus akcepti rifuĝantojn kaj doni al ili la necesan subtenon por starigi memstaran, liberan vivon. Krome necesas certigi, ke ili povu vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio. La kongresanoj konstatis kun zorgo, ke la postuloj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ne estas respektataj

en multaj partoj de la mondo. Ili memorigis, ke homaj rajtoj estas universalaj rajtoj, kiuj validas por ĉiuj homoj tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

La plena teksto de la rezolucio estas legebla en la [Gazetara Komuniko](#) de UEA n-ro 1118, de la 5-a de aŭgusto 2023.

NOVAJ VORTOJ

- diskriminacio: maljusta traktado de unu homo aŭ hom-grupo kompare kun aliaj.
- en-migrado: vojaĝado de unu loko al alia por tie restadi kaj tie ekloĝi kaj labori.
- etoso: ĝenerala sento, kiun la ĉirkaŭaĵo prezentas al la ĉeestantoj.
- integriĝi: kun-unuiĝi, tiel ke oni fariĝas parto de la tuto.
- ĵurnalisto: profesia raportisto por gazeto.
- klimato: veteraj kondiĉoj en difinita regiono, aŭ en la tuta Tero, dum longa periodo.
- konstati: ekscii, eltrovi, aŭ rimarki ion kiel fakton aŭ kiel gravan informon.
- mem-stara: staranta, aganta, pensanta, vivanta per si mem, sen helpo de aliaj.
- migranto: homo, kiu vojaĝas de unu loko al alia.
- modela: tiel perfekte farita, ke ĝi estos imitinda en postaj okazoj.
- n-ro: numero
- parto-prenanto: ĉe-estanto en iu aranĝo.
- rezolucio: anonco, kiun faras asocio aŭ kunveno, pri sia pozicio aŭ opinio pri iu demando.
- rifuĝanto: homo, kiu estas devigata forlasi sian propran loĝlokon pro milito aŭ alia serioza situacio.
- sub-teno: helpo al homo, asocio, projekto, politiko aŭ simile, por ke ĝi sukcesu.
- UEA: Universala Esperanto-Asocio



uea.facila

FACILAJ
ARTIKOLOJ EN
ESPERANTO

UEA.facila.org aperigas informojn kaj novaĵojn pri UEA kaj la Esperanto-movado per mallongaj artikoloj en facila lingvaĵo por helpi homojn, kiuj nun lernas la lingvon. La artikoloj enhavas nur la radikojn troveblajn en specifa listo de facilaj vortoj. Se en artikolo aperas vorto, kiu ne estas en la listo, eblas facile trovi difinon de ĝi en la retejo. Nepre vizitu, subtenu kaj diskonigu UEA.facila!

Listo de kongrestemaj prelegoj en la 4-a VK

Klarigoj:

-  – prelego aŭ ateliero okazis vive, kun aktiva partopreno de la spektantaro
-  – prelego estis antaŭregistrita
-  – prelego, kiun eblas re-spekti poste (en <https://www.youtube.com/ueaviva>)
- **108-a UK** – registrita prelego el la UK en Torino

Enmigrado kaj lernejoj en mia lando | Laura Brazzabeni | [En UEAviva](#)

Enmigrado - pli ol 100 milionoj da rifuĝantoj tutmonde | Thomas Bormann | [En UEAviva](#)

108-a UK: Kongresa Temo: “Sen migrado nenia evoluo” | Judith Jackson | [En UEAviva](#)

108-a UK: Kongresa Temo: “Migrado kaj integriĝo” | prelegoj de Raja Iftikhar, Manuela Ronco, Manuela Burghilea | [En UEAviva](#)

Enmigrado en Israelon kaj Palestinon inter 1800-2000 | Amri Wandel | [En UEAviva](#)

Migrantoj kaj rifuĝintoj: la katolika vidpunkto | Marija Belošević, prezidantino de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) | [En UEAviva](#)

108-a UK: Kongresa Temo: “Migrado: sperto kiel migranto en D. R. Kongo kaj en Tanzanio”; “Israelo kaj la juda enmigrado” | Jeremie Sabiyumva, Amri Wandel | [En UEAviva](#)

 108-a UK: Kongresa Temo: “Regionaj komunumoj en Afriko”; “EKO!”; “Migrado en Islando” | Costantine Mashauri, Marjolaine Bert, Ragnar Baldursson | [En UEAviva](#)

  Instruado kun ukrainaj rifuĝantoj en itala lernejo: spertoj, problemoj kaj strategioj | Massimo Ripani | [En UEAviva](#)

Danke al la laboroj por la VK eblas reĝui la prelegojn de la UK, kiuj estis registritaj, plus novajn prelegojn, kiuj okazas ekskluzive por la VK. La prelegoj de la VK, kiuj estas registritaj, restas spekteblaj en la virtuala kongresejo – <https://vk.retevent.com> – ĝis la fino de la koncerna jaro por tiuj, kiuj aliĝis al la VK: <https://vk.esperanto.net>. Poste, se la aŭtoroj konsentis, ili ankaŭ estas disponigitaj laŭgrade en la jutubkanalo de UEA, UEAviva: <https://www.youtube.com/ueaviva>.

Kiel subteni Universalan Esperanto-Asocion (UEA)

- ★ **Aliĝante** kiel individua membro (IM) de UEA | esperantistoj povas aliĝi al UEA kiel IM en la kategorioj membro-abonanto (MA) aŭ membro baza (MB). MA ricevas eldonaĵojn de UEA, kiel la revuon *Esperanto*, papere; MB ricevas ilin elektronike. Tiuj, kiuj aĝas malpli ol 36 jarojn en la unua tago de la jaro, estas samtempe membroj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), la junulara sekcio de UEA, kaj aldone ricevas la revuon *Kontakto*. Krom subteni la agadon de UEA, IM rajtas je specialaj kotizoj en la Universala Kongreso de Esperanto (UK), senpaga aliĝo en la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), rabatojn en la Libroservo de UEA kaj aliaj. La membreco validas por la koncerna jaro. Oni povas aliĝi por la kuranta jaro aŭ por venontaj jaroj, pagante la **kotizon** de la jaro. Tiuj, kiuj aĝas malpli ol 26 jarojn, ĝuas 50%-an rabaton, kaj tiuj, kiuj aĝas malpli ol 20 jarojn, ĝuas 75%-an rabaton en sia kotizo. Alternative eblas aliĝi kiel dumviva membro-abonanto (DMA) aŭ dumviva membro baza (DMB), pagante 30-oble la koncernan kotizon. Tiuj, kiuj ne povas pagi la kotizon, estas bonvenaj peti sian aliĝon pere de **Fondaĵo Canuto**. Ĉiuj, kiuj akceptas la statuton de UEA, estas bonvenaj aliĝi.
- ★ **Aliĝante** al Societo Zamenhof (SZ) kaj al la programo **Alianco 365** | SZ-anoj donacas duoble la kotizon de MA al la ĝenerala kaso de UEA. Aliancanoj donacas po 365 EUR jare aŭ alternative po 31 EUR monate al la ĝenerala kaso de UEA. Tiuj malavaraĵ grupoj grave subtenas la agadon de la Asocio.
- ★ Aldone: **aliĝante** kaj donacante al la Universala Kongreso de Esperanto (UK), **donacante** al Fondaĵo Canuto kaj aliaj fondaĵoj de UEA, **aĉetante** en la Libroservo de UEA, **fariĝante** Patrono de TEJO aŭ **abonante** la revuon *Kontaktoj*, **ekzameniĝante** pri Esperanto per la KER-ekzamenoj, proponante sin kiel **komisiito aŭ komisionano** en UEA, kunlaborante kun la landaj kaj fakaj asocioj de UEA inter multaj aliaj ebloj. UEA estas ni!



**109-A UNIVERSALA
KONGRESO DE
ESPERANTO**

ARUŜO, TANZANIO, 3-10 AŬGUSTO 2024

Aliĝu al la 109-a UK, kiu okazos en Aruŝo,
Tanzanio, sub la temo:

“Lingvo, homo kaj medio
por pli bona mondo”

<https://uk.esperanto.net/2024>



Thomas Bormann | Reĝisoro de la Kongresa Temo en 2023

Thomas Bormann estas ĵurnalisto el Germanio, esperantisto depost la 70-aj jaroj. Bormann vivis dum pluraj jaroj en Turkio kaj Grekio por raporti el tiuj landoj por la germana radio-reto ARD. Ofta temo por li estis la situacio de la multaj rifuĝintoj, kiuj trapasis aŭ restis en Turkio respektive Grekio.